

1985 junio
78a jaro
n-ro 954 (6)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



**Trafe utiligi
niajn
homajn
rimedojn**

**Estrara
Raporto
pri la agado
en 1984**



Vi trovos,

ke la Estrara Raporto pri la agado de UEA dum 1984 okupas preskaŭ la tuton de ĉi tiu revunumero. Kvankam multaj el la temoj, kiujn traktas la Raporto, rolis ankaŭ en la pasintjara revukolekto, ne pensu, ke vi iasence jam "legis" ĉi tiun numeron. La Raporto enhavas multajn novajn faktojn, analizojn, konkludojn, sugestojn kaj opiniojn, kiujn vi ne trovis pli frue sur la revuaj paĝoj. Ĉu ni do solvis la demandon "Legi aŭ ne legi"? Fakte, "ne legi" en ĉi tiu kunteksto signifas viciĝi inter esperantistojn, kiuj ne interesiĝas pri Esperanto. Espereble vi ne pretas ofendi vin mem kaj nin per aliĝo al la tendaro de nelegantoj. Cetere, la Raporto lasis malmulton alian eniri ĉi tiun numeron. Tamen, jam sur la apuda paĝo vi trovos gravan informon pri la du lastatempe famiĝantaj mallongigoj: BSO kaj DLT. Vi trovos tie ankaŭ la respondon al la demandoj: kie nun estas kaj kion faras Victor Sadler, kiu dum multaj jaroj estis sinonimo de ĉi tiu revuo de UEA.

Enhavo

- 101 Lingvo-problemo: DLT-teamo eklaboras (Toon Witkam)
- 102 Vojaĝplanoj por la 71a Universala Kongreso: Favorpreze kun UEA al Ĉinio
- 103 Raporto de la Estraro pri la agado dum 1984: Enkonduko; Ĝeneralaĵoj; Administrado
- 104 Financo
- 105 Institucio Hodler '68; Periodaĵoj kaj serioj
- 106 Kongresoj
- 107 Jubilea Jaro, Informado
- 108 Eksteraj rilatoj
- 109 Kulturo kaj edukado
- 111 Junulara sekcio (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)
- 112 Landa kaj regiona agado
- 113 Faka agado
- 114 Esploro kaj dokumentado
- 115 Finaj vortoj; Financaj aldonaĵoj al la Raporto
- 119 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 120 Anoncetoj

Ĉiuj membroj de la asocio ricevas ĉi tiun jarraporton. Pro tio, kelkaj MJ-membroj kiuj abonas la revuon per kolektiva abono ricevos du ekzemplerojn. Ne ĝeniĝu pri tio! Uzu la ekstran ekzempleron por varbi novan membron por UEA!

La kovrilo

montras iom da niaj valoraj homaj rimedoj el la pasinta jaro – la jaro de la Estrara Raporto. Sube vidiĝas aŭskultantaro el la 2a Balkana Esperanto-Kongreso en Ateno, kie oni serĉis manierojn utiligi niajn homajn rimedojn el ĉiuj landoj de la regiono. Supre estas bildo de informbudo okaze de la 69a Universala Kongreso en Vankuvero. La ĉiujara Universala Kongreso de Esperanto ĉiam estas impona renkontiĝo, kie oni povas trovi trafajn manierojn informi pri Esperanto kaj tiel altiri novajn kaj freŝajn homajn rimedojn.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tôkyô, 153 Japanio.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio; ☎ (06) 95 25 713.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 237 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

DLT-teamo eklaboras

La sekva artikolo prezentas la lastatempajn evoluojn de la projekto DLT, kies signifon verŝajne ĉiu leganto de Esperanto jam komprenas. La redaktoro, kiel studinto de lingvistiko kaj semantiko, ne povas rezisti kontraŭ la tento enkondukcele komenti la pompecan deklaron de la nederlanda komputilisto-lingvisto prof. Hugo Brandt Corstius. Se li degnus sensupoze esplori la semantikon de Esperanto, li verŝajne trovos multon interesan por la studo de la semantiko ĝenerale. Esperanto ne interesas multajn lingvosciencistojn, ĉar ĝia socia pozicio ofte ne portas ion pozitivan por iliaj karieroj, dum ili ne vidas en ĝi ion de lingvistika intereso, kiu ne estas aliloke trovebla. Pri tiu lasta punkto ili povas erari kaj supozeble ne pli ol kiam temas pri la semantiko. Kiu lingvosciencisto deziras famiĝi per tiu "malkovro"?

Komenciĝis ĉe la firmo BSO en Utreĥto, Nederlando, la kreado de provsistemo de aŭtomata tradukado angla-(Esperanto)-franca en la kadro de la projekto DLT (Distribuita Lingvo-Tradukado). La projekto, laste priskribita en *Esperanto* de decembro, eniris fazon de rapida kresko surbaze de laborplano jam firme difinita por plurjara periodo. Ĝis la jaro 1991, BSO antaŭvidas investi en DLT 17 milionojn da guldenoj, el kio 7,6 milionojn kontribuos la nederlanda registaro.

En la kreskanta DLT-teamo en Utreĥto laboras nun tuttempe d-ro Victor Sadler, kiel specialisto por la lingvoparo angla-Esperanta, kaj d-ro Klaus Schubert (ĝis antaŭ nelonge lingvistika asistanto en Universitato de Kiel, FR Germanio), kiel specialisto por la IL (t.e. la interna interlingvo de la DLT-sistemo, iom pli rigore difinita varianto de Esperanto). Ian Fantom (Britio) alvenis kiel provizora programisto por la programlingvo Prolog. Kiel eksteraj konsilantoj pri terminologio funkcias Rüdiger Eichholz en Kanado kaj Wim Jansen en Nederlando. Ankaŭ



De maldekstre: Victor Sadler kaj Klaus Schubert.

UEA kontribuas sur la terminologia kampo, laŭ aparta kontrakto.

Laŭ la laborplano, jam en 1987 devos esti eble montri funkciantan provsistemon por traduki teknikajn tekstojn el la angla al la franca. Tamen estas certe tro frue por paroli pri ia signifa antaŭenpaŝo pere de Esperanto! Sur la vojo al la efektivigo de DLT atendas diversaj obstakloj kaj minacoj, interalie:

– *Konkurenco.* Minimume dek aŭtomataj traduksistemoj estas nun prilaborataj en diversaj landoj. Se iu el ili sukcesus, DLT povus perdi la konkuron.

– *Negativaj, sed influhavaj kritikoj.* Ekzemple, konata nederlanda komputilisto-lingvisto, prof. d-ro Hugo Brandt Corstius, laste deklaris: "La projekto DLT estas erara: Esperanto ne havas sintakson, ĉar, kiam la lingvo estis konstruita, sintakso ankoraŭ ne ekzistis. Esperanto ankaŭ ne havas semantikon, ĉar ĝi estas ĉiam dua lingvo." Ne temas nur pri tio, ĉu tiaj kritikoj pravas aŭ ne, sed pri tio, ĉu BSO en la venontaj jaroj povos respondi per praktikaj rezultoj.

– *Manko de esperantlingvaj specialistoj.* Per sia elekto de Esperanto kiel "spino" de DLT, BSO samtempe ligis ĝian sorton kun la ekzisto kaj diskresko de tuta malgranda armeo da trejnataj lingvistoj, tradukistoj kaj leksikografoj en la Esperanto-mondo. Por ĉiu lingvo, el aŭ al kiu DLT tradukos, necesos trovi fakulojn, kiuj perfekte regas tiun lingvon kaj Esperanton. Jam por la lingvoparo Esperanto-franca (vidu la anoncon en la decembra *Esperanto*, p.218) montriĝis tre malfacile varbi taŭgan kandidaton. Post nur tri jaroj jam necesos trovi kvar vortaristojn Esperanto-francajn; la samo validas pri la paro angla-Esperanto. Manko de sufiĉaj kaj taŭgaj kandidatoj ankoraŭ povus mortigi la tutan projekton!

Ĝuste pro la grandaj monsumoj investataj en ĝi, la DLT-teamo troviĝas sub granda premo produkti videblajn rezultojn kaj montri konvinkajn progresojn en firme difinitaj tempolimoj.

Unuflanke, BSO renkontas problemojn ĉe la serĉado de kvalifikitaj kunlaborantoj; aliflanke ĝi estas inundata de leteroj de personoj, kies helpon BSO bedaŭrinde ne povas utiligi, almenaŭ ne en baldaŭa estonteco. En la lastaj monatoj BSO ne plu sukcesis eĉ respondi al ĉiuj bondeziroj, demandoj, petoj kaj proponoj, kiuj alfluis. Tion fari signifus endanĝerigi la progreson de la laboro mem. Ja ne temas pri mamuta firmo kiel IBM aŭ Philips, kiuj havas apartan fakon por publikaj rilatoj. Precipe necesas malakcepti multajn sinproponojn el landoj ekster la Eŭropa Komunumo. Necesas kompreni, ke por industria projekto kiel DLT ludas rolon ĉiaspecaj praktikaj kaj financ-politikaj konsideroj.

Necesas ankaŭ foje klarigi, ke BSO rigardas sin nur kiel uzanton de Esperanto, ne kiel aganton por ĝi. Ĝia sola intereso en Esperanto estas ties rolo kiel bazo de interna pontolingvo en komputila traduksis-

temo. Konsekvence, BSO tute ne havas starpunkton pri la evoluo de la lingvo Esperanto aŭ pri la celoj aŭ politiko de ĝia movado – nek tempon okupiĝi pri tiuj kampoj. La gvidantoj de la DLT-projekto (Olde Kalter kaj Witkam) ne apartenas al iu ajn movada grupo. Aliaj membroj de la esplor-teamo devas strikte distingi inter sia profesia laboro por DLT kaj sia eventuala agado en la Esperanto-movado. BSO ne intencas ludi rolon de financa subtenanto de la Esperanto-movado.

Malgraŭ tiuj negativaj limigoj de ĝiaj rilatoj kun la Esperanto-movado, ekzistas tamen interesaj perspektivoj de reciprokaj avantaĝoj.

Pluraj el la nun komencitaj laboroj ĉe BSO povas havi utilon ankaŭ al la Esperanto-movado. Temas pri:

– *Normigo de klavaroj.* BSO jam progresas pri normigo de Esperanta klavaro por uzo kun komputiloj de la markoj ACT Apricot kaj IBM PC.

– *Kreo de teksto-banko.* Por la DLT-projekto estos kompilita kolekto de bonkvalitaj informaj (teknikaj k.s.) tekstoj en Esperanto, en komputile legebla formo, por ĉiaspecaj lingvaj analizoj.

– *Aŭtomata vortaro.* Temas pri tre ampleksa, unulingva komputila vortaro de Esperanto (adaptita al ĝia DLT-varianto), kun rigora sistemigo de la informoj, i.a. pri semantikaj kategorioj, kuntekstaj kondiĉoj k.s.

– *Dulingvaj vortaroj.* Estas kreataj ankaŭ angla-Esperanta kaj Esperanta-franca vortaroj por komputila uzo, ankaŭ ili kun tre detalaj kaj rigore difinitaj analizoj de la signifoj, nuancoj, uz-kondiĉoj ktp. de ĉiu vorto. Poste sekvos aliaj lingvoj.

– *Fakaj terminaroj.* BSO devos intense labori por modernigi kaj kompletigi la Esperantajn terminojn por diversaj specialaj kampoj (ekz. elektroniko, informadiko, ekonomio, internacia juro). Jam progresas la laboro pri la kampo de aviadil-prizorgado.

Jam en 1986 parto de ĉi tiuj informaroj estos disponebla, ankaŭ por esperantologoj kaj leksikologoj ekster BSO. Krome, multaj laboroj de BSO (ekz. studoj pri sintakso) povas havi pli vastan gravecon por la esperantologio. BSO intencas daŭre informadi pri siaj laboroj super Esperanto kaj esperas, ke tio kontribuos al la vigligo de esperantologiaj studoj ĝenerale, precipe ĉe profesiaj lingvistoj kaj universitataj medioj.

Siavice, ankaŭ la projekto DLT povas profiti el pli vigla scienca interesiĝo pri Esperanto.

BSO elektis Esperanton kiel bazon de sia traduksistemo ĝuste pro tio, ke la lingvo jam havas siajn historion, spertojn, vortarojn, terminologojn kaj lingvistojn. Ĝi esperas, ke per kongresoj, seminarioj, artikoloj kaj recenzoj ĝi povos ĉerpi el tiu materia kaj socia bazo utilajn kritikojn kaj fakajn kontribuojn al diversaj aspektoj de DLT.

Toon Witkam

VOJAĜPLANOJ POR LA 71a UK

Favorpreze kun UEA al Ĉinio

Kvankam ni ĝis nun ne aperigis multajn informojn pri la preparlaboro por la 71a Universala Kongreso de Esperanto venontjare en Pekino, multo okazis. En majo 1984 du funkciuloj de UEA pasigis semajnon en Pekino kaj kunsidis kun plej diversaj respondeculoj de la ĉinaj registaro, parlamento, turisma servo, flugkompanio, urbaj aŭtoritatoj ktp. Iĝis klare, ke la Kongreso ĝuos ĝis nun nespertitan apogon de la ŝtataj aŭtoritatoj. En februaro 1985 okazis dua samspeca vizito, dum kiu oni daŭrigis la traktadon, subskribis kontraktojn, findecidis pri kongresaj ejoj, vizitis la kongresajn hotelojn ktp. Ni tiam interkonsentis, ke la nacia flugkompanio – Civil-Aviada Administracio de Ĉinio – estos la oficiala flugkompanio de la 71a UK. Komence de junio okazis plua traktado kun ĝia oficejo en Londono. Simile intensaj kontaktoj daŭris ankaŭ kun Ĉina Internacia Turisma Servo, tiel ke UEA jam disponas pri oficialaj turismaj prezoj en Ĉinio por la jaro 1986.

Post tiuj preparlaboroj – kaj pluraj aliaj esploroj –

UEA tre baldaŭ anoncos tutan aron da favorprezaj vojaĝplanoj por la partoprenantoj de la 71a UK en Pekino. Temos pri kvin aŭ ses diversaj aranĝoj, kun pli aŭ malpli da inkluzivitaj turismaj allogaĵoj de Ĉinio, tiel ke ĉiu povos elekti laŭ sia intereso (kaj financa stato). La plej malmultekosta aranĝo inkluzivos nur la flugvojaĝon, kiu laŭ la prezoj pri kiuj ni nun disponas kostos – el Eŭropo – ĉirkaŭ 2 500 guldenojn. Eventuale, ankaŭ tiu prezo estos malaltigebla. Tamen, tiuj kiuj volas profiti la longan vojaĝon ankaŭ por admiri ion el la plej interesaj vidindaĵoj de Ĉinio, devas kalkuli pri la sumo de ĉ. 4 000 ĝis 5 000 guldenoj (vojaĝo, hotelo, manĝoj, ekskursoj).

Ni ja bedaŭras, ke ni iom malfrue elpaŝas kun ĉi tiuj planoj, sed tio okazas nur ĉar UEA ne volis paroli pri siaj planoj antaŭ ol havi realan bazon kaj fidindajn partnerojn kaj prezojn. Tiuj, kiuj faris similajn vojaĝojn kun UEA al Brazilo en 1981, sendube scias, kial ili ankaŭ por Ĉinio decidiĝos elekti UEA-aranĝojn: unuflanke oni povas fidi la aranĝojn kun UEA, aliflanke oni tiel plej rekte helpas al la Movado ĝenerale, ĉar ĉia eventuala profito estos uzita por progresigo de Esperanto. Ni konsilas, ke vi ne rapidu fari decidon antaŭ ol vidi, kion UEA proponas. Pli da informoj haveblos ĉe la UEA-giĉeto en Aŭgsburgo.

Raporto de la Estraro pri la agado de UEA dum 1984

1. ENKONDUKO

Tiu ĉi Estrara Raporto traktas la laboron de UEA dum la kalendara jaro 1984. Estas por la deka sinsekva fojo, ke la Estrara Raporto aperas en la revuo *Esperanto* (unufoje tio okazis en 1976). Ĉi tiun revu-numeron ricevas ĉiuj individuaj membroj de la Asocio, do ankaŭ tiuj, kies membreco ne inkluzivas la abonon de la revuo. Ankaŭ aliaj esperantistoj povas senpage ricevi la numeron kontraŭ simpla peto al la Centra Oficejo.

La Raporto estas kolektiva verko (kaj respond-eco) de la naŭ estraranoj kaj la ĝenerala direktoro de UEA. Kvankam la disdivido de la ĉapitroj restas tradicia, ni faris maksimuman klopodon plekti en la Raporton kiel eble plej multe da faktoj, sed tiel ke ili ne estu ripetigoj por la abonantoj de la revuo. Kiel vi konstatos el la sekvantaj ĉapitroj, la jaro 1984 estis plena je problemoj, sed ankaŭ je atingoj, ĝuste tiel kiel okazas en dinamisma, vivanta internacia organizaĵo.

2. ĜENERALAĴOJ

1. Statuto kaj Ĝenerala Regularo: En 1984 ne okazis ŝanĝoj en la Statuto aŭ en la Ĝenerala Regularo de la Asocio.

2. Honora Patrona Komitato: Ĉi tiu komitato iĝis 11-persona, pro la alelekto en 1984 de prof. Paul Ariste (Soveta Unio) kaj s-ro Hu Yuzhi (Ĉinio).

3. Honoraj membroj: La Asocio havis jarfine dudek naŭ honorajn membrojn. En 1984 aldoniĝis s-roj E. Chicot (Francio), K. Draĵev (Bulgario), Miyamoto Masao (Japanio), J. Régulo Pérez (Hispanio) kaj B. Vogelmann (FRGermanio).

4. Komitato: La Komitato por la nuna elekto-periodo (1983-86) ampleksas 86 komitatanojn (64A, 7B kaj 15C) kaj 8 observantojn. Restis jarfine vakaj la loko por la kolombia observanto kaj 2 rezervaj

lokoj por C-komitatanoj. La perua asocio nomis dum la jaro kiel observanton s-ron Ulpiano Villanueva. En Vankuvero la Komitato nomis propran sekretarion, s-ron W. du Têmple (Kanado), por helpi al la Ĝenerala Sekretario pri specife komitataj taskoj.

5. Estraro: La Estraro kunsidis en Roterdamo nur unufoje, en aprilo (okazis tamen kunsidoj en la lastaj tagoj de 1983 kaj la unuaj de 1985). Ĝi ankaŭ kunsidis dum kaj post la UK en Vankuvero.

6. Komisionoj kaj komisiitoj: Plena listo de komisionoj kaj komisiitoj troviĝas en Jarlibro 1984, p. 20. Aldoniĝis en Vankuvero 5-persona komisiono, kiu preparos la kandidatigojn por la elektoj en 1986. Okazis ankaŭ kelkaj aliaj ŝanĝoj, kiujn prinotos la Jarlibro 1985.

7. Revizoroj: Neniu ŝanĝo.

8. Laborplanoj: La 4a Baza Laborplano (1983-1987) restas aktuala. La teksto aperis en numero 11/1983 de *Esperanto* sur p. 181, kaj estas kompletigita per la libreto *Kiu faru kion?*, kiun necesis dufoje represi.

9. Landaj kaj Fakaj Asocioj: La nombro de aliĝintaj landaj asocioj estis 45. Aldoniĝis du novaj fakaj asocioj kunlaborantaj: Mondpaca Esperantista Movado kaj Esperantlingva Verkista Asocio. UEA en la jarfino havis 5 aliĝintajn kaj 30 kunlaborantajn fakajn asociojn.

3. ADMINISTRADO

1. Oficistoj: La meza nombro de oficistoj kaj volontuloj salajrataj de la CO dum 1984 estis 12,2 (kompare kun 11,8 en 1983).

2. Volontula Servo: Foriris en junio s-ino Eva Formaggio post 13-monata laboro por UEA. De januaro ĝis septembro la TEJO/KER-volontulo estis Graham Cansdale kaj dum la lasta parto de la jaro Peter Barclay (ambaŭ el Britio). En 1984 finiĝis ankaŭ dujara laboro en la CO de Alex Humet (Hispanio).

3. Domo: Ekde la mezo de 1984 la konstruo de nova alo en la ĝardeno progresis, kaj en la jarfino estis preskaŭ preta. La alo ampleksas kvin ĉambrojn kaj koridoron, kun suma areo de pli ol 100m².

4. Aŭtomatigo: Prizorgadis la maŝinaron kaj la programojn Ingvar Schoultz. Instaligis nova kompu-

ĈI TIUN NUMERON DE LA REVUO KUN
LA ESTRARA RAPORTO RICEVAS ĈIU
INDIVIDUA MEMBRO DE LA ASOCIO

tilo en la CO (PDP 11/73) por grandigi kaj la memorkapaciton kaj la rapidecon. Grafika Centro en Antverpeno transprenis la antaŭan komputilon (PDP 11/23).

5. Grafika Centro Antverpeno: En 1984 du volontuloj forlasis nin, tiel ke la stabo reduktiĝis al 6 (4 oficistoj kaj 2 volontuloj). Pro la fakto, ke la oficistoj pli kaj pli spertiĝas, montriĝis provizore ne necese serĉi pliajn homojn. La plej granda kliento de GCA restis UEA mem, por kiu oni laboris 287 homtagojn. Sekve venis Flandra Esperanto-Ligo (142 homtagoj) kaj Unuiĝo Franca por Esperanto (94 homtagoj). Por ne-esperantistaj entreprenoj GCA laboris entute 133 homtagojn. Meze de la jaro GCA transprenis la produktadon kaj administradon *Monato* kaj sukcesis renormaligi ĝian aperritmon. Zorgojn kaŭzis kelkaj grandaj debitoroj, kiuj ŝuldis jarfine al la centro ĉ. 28 000 gld.

6. Membraro: En 1984 UEA havis 32 923 aligitajn membrojn, el kiuj 9 463 estis malpli ol 26-jaraj kaj, do, la asociaj membroj de TEJO. (En 1983 respektive 31 062 kaj 8 797.) La sumoj por la individuaj membroj estas: 1 177 MJ, 3 694 MA, 198 MJ-K, 192 MA-K, 982 DM (inkl. 17 DM-K) kaj 29 HM, entute 6 272 membroj (6 446 en 1983). Plej multajn individuajn membrojn havis Francio. Laŭlandan resumon vi trovos sur p. 39 de *Esperanto* (feb. 1985). Ni nun enkalkulas pliajn individuajn kaj aligitajn membrojn ol en februaro, pro kotizoj intertempe ricevataj. Kompare kun 1983, la individua membraro malkreskis, sed la aligita membraro kreskis je ĉ. 1 600, ĉefe en Pollando. La suma membronombro de la Asocio (39 195) rekordis denove (37 508 en 1983) kiel ĉiujare de post 1980.

7. Societo Zamenhof: 167 personoj membriĝis en tiu Societo en 1984 (kompare kun 182 en 1983).

8. Delegita Reto: En Jarlibro 1984 aperis 1 216 delegitoj, 184 vicdelegitoj, 75 junularaj delegitoj kaj 2 216 fak-delegitoj. Entute temas pri reto kun 3 691 delegitaj funkcioj en 69 landoj. Aperis 8 pliaj landoj kun asocio sen delegitoj. Aldoniĝis du novaj landoj: Kongo kaj Benino. Apartajn kreskojn en la reto oni konstatis en Korea Respubliko kaj Irano.

9. Jarlibro: La 416-paĝa Jarlibro por 1984 aperis en junio. La delegita reto estis aŭtomate kompostita el la komputila adresaro. La jara temo de la Jarlibro estis "Vojaĝrabatoj" kiu prezentis en aparta sekcio kaj en laŭlandaj rubrikoj koncizajn resumojn pri rabat-biletoj, ĉefe fervojaj. Pluraj aliaj sekcioj estis reverkitaj. Multaj lokaj grupoj informis pri siaj kunvenoj per anoncetoj. La Jarlibro estis ekspedita al la eŭropaj membroj tra FRGermanio, kaj aerfrajte tra Britio al la ekstereŭropanoj.

10. Eldona agado: Dum 1984 UEA eldonis kvar librojn, unu el ili preskaŭ 900-paĝa. La romano *Kiuj*

semas plorante... de O. Kníchal kaj É. Tófalvi aperis en aprilo en 1 500 ekzempleroj. *Faktoj kaj fantazioj* de Marjorie Boulton aperis en julio en 3 000 ekzempleroj, el kiuj 900 forvendiĝis ĝis la jarfino. En septembro aperis *Esperanta antologio* sub la redakto de William Auld. Ĝi estis presita en Ĉinio en 3 000 ekzempleroj. Jarfine aperis la 175-paĝa libro *Diskriminacio*, kiu resumis la kongrestemajn referaĵojn el la UK en Stokholmo. Pri eldonaĵoj de SEC vidu la ĉapitron 13.

11. Libroservo: La vendoj en 1984 atingis 280 000 gld., kompare kun 173 000 gld. en la antaŭa jaro. La kresko ŝuldiĝas ĉefe al la apero de du ampleksaj eldonaĵoj de UEA kaj al la dissendo de aktuala libro-katalogo en aprilo.

12. Varbado: Aperis 4 000 kolore presitaj afiŝoj kun bonetosa sceno el IJK kaj la slogano "Esperanto, por agrablaj renkontiĝoj". Oktobre eldoniĝis malpeza flugfolio kun la kotizoj por 1985, kiun ni dissendis ankaŭ kun la revuo *Esperanto*. Jarfine aperis novspeca flugfolio kun la titolo "Kiel mi povas uzi Esperanton?" Ĝi estas verkita en simpla lingvaĵo kaj direktis sin ĉefe al novaj lernintoj. Ĝi plej detale prezentis nian Korespondan Servon Mondskalan. Ĝia 1500-ekzemplera stoko elĉerpiĝis en ses semajnoj kaj estis en 1985 plibonigita kaj represita. Dum la 69a UK funkciis budo de UEA kaj TEJO.

13. Kotizperantoj kaj Ĉefdelegitoj: La Asocio nomis unuafoje ĉefdelegiton en Irano (s-ro A.R. Mamduhi) kaj kotizperanton en Hinda Unio (FEB en Kalkato sub prizorgo de s-ro S. Pal). Kotizperanto en Kolombio iĝis s-ro Santiago Alvarez G., anstataŭ s-ro L. Restrepo. En Kanado s-ro W.D.B. Hackett, post 30-jara servado, pludonis kotizperajn kaj ĉefdelegitajn laborojn al s-ino Merle Haltrecht-Matte.

14. Poŝtmarkvendado: En 1984 la Asocio enspezis pro vendado de poŝtmarkoj 2 206 gld., kompare kun 1 610 gld. en la antaŭa jaro. La Centra Oficejo volonte ricevadas viajn uzitajn poŝtmarkojn.


4. FINANCO

1. Enkonduko: Kiam ni fine de ĉiu jaro trairas la longan procedon por saldiĝi la kontojn de la Asocio, ni konstatas, ke la komitato aprobita buĝeto por la koncerna jaro traktis fakte esperojn pli ol funde bazitajn prognozojn. Ne eblas grave influi tiun situacion, ĉar niaj devoj (kostoj), unuavice al la membraro, estas multe pli fortaj ol la devoj (niaj rimedoj) de tiu membraro al la Asocio. Niaj devoj estas elspezoj, dum niaj enspezoj restas esperoj. Tion pruvis ankaŭ la financa jaro 1984.

2. Spezokonto: Malgraŭ la konstantaj zorgoj en la CO, en la Komisiono pri Financo kaj Administrado kaj en la Estraro, montriĝis neeble resti interne de la

limoj, kiujn preskribis la buĝeto. Eblis rezigni pri kelkaj deciditaj agadoj, sed tion sendube kontraŭstarus la Komitato, nun, du jarojn antaŭ la Jubileo. Pluraj ŝparoj ja okazis kompare kun la buĝetitaj sumoj (Centra Oficejo, korespondaj kostoj), sed okazis ankaŭ pluraj transpaŝoj de la buĝetaj limoj (salajroj, vojaĝkostoj). Tamen, la elspezoj entute saldiĝis je 6 500 guldenoj malpli ol buĝetite. La fonto de la negativa saldo estas tiuj buĝetitaj esperoj, kiuj ne realiĝis. La kotizoj portis 22 500 malpli, la Grafika Centro 77 000, la Kongreso 23 500, turismaj aranĝoj 37 000 guldenojn malpli ol buĝetite. Do, la buĝeta optimismo pri enspezoj montriĝis ekscesa.

3. Bilanco: Malgraŭ la negativa saldo de 115 000 guldenoj en la spezokonto de 1984, la asocia bilanco fine de la jaro montras plian kreskon de la asocia havaĵo kompare kun la antaŭa jaro. Ja temas nur pri la aktivoj (nun 2 275 750; antaŭ unu jaro ĉ. 80 000



Dum 1984 enhejmiĝis kiel la Financa Administranto de UEA John Rapley el Britio

malpli), dum la sumo de la kapitalaj kontoj en 1984 malkreskis je ĉ. 56 000 guldenoj. Tiujn ŝanĝojn kaŭzis ĉefe la sekura investo en la vastigon de la Domo de UEA kaj la plivaloriĝo de la libroprovizoj (pluraj novaj libroeldonoj de UEA), kies valoro preskaŭ duobliĝis en la lastaj kvar jaroj: 153 000 en 1980, nun 291 000.

La saldoj de la fondaĵoj ne rivelas unuavide la grandegan aktivadon, kiun UEA financas el tiuj apartaj rimedoj. Kvankam la saldoj de la fondaĵoj entute fine de 1983 kaj 1984 preskaŭ identas, aparta superriĝo (vidu fine de la Raporto) montras, ke la Asocio en la pasinta jaro elspezis (kaj enspezis) ĉ. 150 000 guldenojn, por la bono de la tuta Esperanto-movado.

4. Konkludo: Tiel la spezokonto kiel la bilanco, klare montras la pretecon de la Komitato kaj de la Estraro ne avari rilate la financadon de la centra rolo,

kiun la Asocio vole-nevole devas ludi en la Movado nun ĉe la sojlo de la Jubileo. Malgraŭ tiu unuavide nekonservativa politiko, la financa situacio de UEA restis ankoraŭ sufiĉe stabila dum 1984. Tamen, pli aktiva subteno de la membraro, ankaŭ finance, estas ja necesa, des pli ke la Estraro nun kuraĝas proponi al la Komitato buĝeton por 1986 kun negativa saldo de 45 000 guldenoj. Tio nun ne estas buĝetado de "mal-esperoj" sed iom klara atentigo, ke la financado de la preparoj por la Centjara Jubileo estas afero, kiu devus koncerni ĉiun membron de UEA, ĉiun esperantiston sur la terglobo.

5. INSTITUCIO HODLER '68

La estraro de la Institucio restis senŝanĝa; ĝian konsiston vi povas legi sur paĝo 23 de la Jarlibro 1984. Sed ekster tio Institucio Hodler frontis plurajn perturbojn aŭ novajn situaciojn dum la jaro 1984. La administrado, kiel antaŭvidite, transiris de s-ino J. ten Hagen – al kiu ni refoje kore dankas – al la Centra Oficejo. La kontoj nun havas lokon denove, do, en la centra komputilo de UEA.

La ĉefaj investaĵoj de la Institucio (loĝdomo en Roterdamo kaj oficeja domo en Antverpeno) liveris siaspecajn zorgojn. Ekzemple, en Roterdamo, oni devis elspezi grandan sumon por duobla-vitraj fenestroj kaj aliaj plibonigoj por sekurigi regulan enspezon de luantoj. En Antverpeno, la lukontraktoj montriĝis nekontentigaj, pro kio fondiĝis speciala komisiono por prepari kaj negoci novajn.

La neordinaraj elspezoj roterdamaj kaj la necer-teco de regulaj enspezoj antverpenaj kune kaŭzis severan mankon de likida mono, kio kaptis seriozan atenton de la estraro. Pro la cirkonstancoj ĝi kun bedaŭro decidis ne aljuĝi subvenciojn surbaze de la rezulto 1984.

Tiu malfacila decido kompreneble ne estus necesa, se la enfluo de pruntoj kaj donacoj ne estus maldensiĝinta en la lastaj jaroj. La Institucio des pli ĝojas, do, ke – interkonsente kun UEA – ĝia nova informa broŝuro estos vaste distribuita en 1985. La celo de Institucio Hodler '68 estas finance helpi meritoplenajn sekciojn de la Esperanto-movado. Tiurilata sukceso en la venonta tempo dependas de favora reago al la nova informilo, kiu jam estas havebla kontraŭ simpla peto al la administranto ĉe la Centra Oficejo de UEA.

6. PERIODAĴOJ KAJ SERIOJ

1. Revuo *Esperanto*: Simo Milojević redaktis la revuon ĝis majo, kaj ekde la junia numero transprenis la laboron Geoffrey Sutton. La radiorubriko restis sub la kompetenta redaktado de Georges Larglantier (Francio). La rubriko "TEJO-paĝo" aperis sepfoje, malgraŭ la manko de efika kunlaboro de TEJO.

La jarkolekto 77 (1984) ampleksis kiel kutime 220 paĝojn. La nova redaktoro provis atenti kontinuecon en la aspekto kaj enhavo. Sentiĝis certa manko de kompetentaj homoj, pretaj verki por la revuo. Landoj, pri kies agado oni plej ofte raportis en la revuo, estis: Ĉinio, Jugoslavio, Japanio kaj Brazilo. Aparta atento estis donita al la daŭre pli sukcesa agado en Afriko. Inter la plej oftaj rubrikoj estis "Informado" kaj "Faka agado". Fakoj, kiuj ricevis apartan atenton dum la jaro, estis la komputado, tradukado, instruado kaj universitata agado.

La redaktoroj zorgis pri la teknika planado de la revuo. Kompostajn, filmajn kaj enpaĝigajn laborojn plenumis Grafika Centro Antverpeno. S-ino Rejna de Jong daŭre helpis provlegi la kompostaĵojn, kiel ankaŭ Rob Moerbeek de la Centra Oficejo. Oni en FR Germanio, Danlando, Nederlando voĉlegas kaj surbendigas la revuon por la blinduloj. En la nederlanda urbo Groningen voĉlegantojn asistas du teknikistoj de malsanuleja studio, senpage en siaj liberaj horoj. La kopiadon kaj distribuadon al blinduloj en 16 landoj ekde 1983 prizorgas la blindulbiblioteko en Nimego. Administras la kasisto de LIBE. Dum 1984 la revuo havis 6 165 abonantojn, kio estas malkresko kompare kun antaŭaj jaroj. Sendube kontribuis al tio la malfavora stato de la monda ekonomio, kiel ankaŭ la neregula apero de la revuo en la komenco de la jaro. Kvankam la nuna redaktoro planas novigojn, li interpretas la ĝeneralan pasivecon de la legantoj kiel signon de kontento. La meza eldonkvanto kutime estis 7 800. La tarifo por pagitaj anoncoj altiĝis, sed oni el tiu fonto enspezis pli ol 14 300 guldenojn, kompare kun 10 600 en la antaŭa jaro.

2. Kontakto: Ĉi tiu gazeto de UEA kaj TEJO trapasis sian duan jaron en 1984 laŭ la novaj rolo kaj aspekto. La redaktoroj, Anna Brennan (lingve simpla revupartito) kaj Leif Gunnar Nordenstorm (la cetero) efike kaj regule liveris la tekstojn, tiel ke la 6-numera jarkolekto povis aperi akurate. La temoj de la numeroj estis: religio, kooperativoj, homo kaj maŝino, krimo, esplorado, Japanio. La teknika redaktado okazis en la CO, dum la kompostadon, enpaĝigon, presadon kaj ekspedon prizorgis Grafika Centro Antverpeno. La eldonkvanto variis inter 2 100 kaj 2 300 ekzempleroj.

Kvankam la nombro de la abonantoj kreskis dum 1984 (1 547 en 73 landoj, kompare kun 1 342 en 68 landoj en 1983), *Kontakto* ankoraŭ restas malkovrenda por la granda merkato de la novaj esperantistoj, precipe ekster Jugoslavio, Belgio, Japanio, Hispanio, Francio kaj Irano – landoj kun plej multe da abonantoj de la gazeto. Dank' al la aktiva laboro de Hans Bakker pri la agado en Afriko, multaj dekoj da ekzempleroj de *Kontakto* iras kiel legmaterialo al la afrikaj adeptoj de Esperanto. Se similan uzeblecon de *Kontakto* ne baldaŭ malkovros ankaŭ aliaj inter-

naciaj kaj landaj movadaj instancoj, UEA ne povos longe elteni la malekvilibron de la spezoj de tiu ĉi specifa periodaĵo por novuloj kaj gejunuloj.

3. Esperanto-dokumentoj: Sub la redakto de d-ro H. Tonkin kaj teknika prizorgo de s-ro H. Gonin, en 1984 aperis kelkaj *Esperanto-dokumentoj* en la franclingva serio. Ili estis plejparte tradukoj de pli frue aperintaj kajeroj en la Esperanta kaj anglalingva serioj, kiuj siavice ne notis novajn eldonojn en 1984. Jam de kelkaj jaroj UEA serĉas alian redaktoron de ĉi tiu grava serio, ĉar d-ro Tonkin ne sukcesas kombini la taskon kun siaj aliaj devoj en la Asocio. Materialoj el *Esperanto-dokumentoj* estas ankoraŭ tre vaste uzataj precipe en la informa laboro, kaj kelkaj el ili aperis kiel apartaj broŝuroj, i.a. en la nederlanda kaj japana lingvoj. Tamen, progresis laboroj pri kelkaj novaj dokumentoj, kies apero estas atendata en 1985.

7. KONGRESOJ

La 69a Universala Kongreso: 802 personoj el 46 landoj aliĝis al la 69a UK en Vankuvero. Temis pri la unua Universala Kongreso en Kanado, kvankam la kvara en Nord-Ameriko. Ne eblas fanfaroni, kiel en Budapeŝto pasintjare, pri la amaseco nek pri la tutlanda interesiĝo, ĉar vere venis al la Kongreso nur sescento da kongresanoj, kaj oficiala subteno ne estis komparebla kun tiu en Hungario. Malgraŭ tio, estis vigla informkampanjo, kiu rezultigis plurajn televidajn kaj radiajn intervjuojn kaj kelkdekon da gazetaj intervjuoj kaj alispecaj artikoloj. La proksimeco de la loĝlokoj, restoracioj kaj kongresaj salonoj sur la tereno de la Universitato de Brita Kolumbio estis tre oportuna kaj kreis etoson de "rondo familia".

La Alta Protektanto, Robert G. Rogers, vicreĝa provincestro de Brita Kolumbio, honoris la Solenan Inaŭguron de la Kongreso per sia ĉeesto kaj montris propran interesiĝon kaj simpatian por Esperanto. 22 konsulejoj estis reprezentitaj kaj salutis la Kongreson. Ĉefparolanto en la Inaŭguro estis d-ro Max Yalden, ministro-komisiito pri oficialaj lingvoj en Kanado, kiu bone reliefigis la lingvan problemon de la kongreslando.

Malgraŭ la manko de lokaj esperantistoj kun sperto pri Universala Kongreso, LKK kapable laboris; la gazetara servo, libroservo kaj *Kongresa kuriero* estis aparte sukcesaj. La elekto de la kongresa temo "Lingvaj minoritatoj — ĉu nur nacia fenomeno?" estis forte influita de la loka lingva situacio, precipe rilate la indianajn lingvojn, kaj estis tre taŭge apogita de kvarsesia prelegserio de d-ro John Wells, "Lingve tra la mondo". Ne mankis tradiciaj — kaj sukcesaj — programoj kiel la Tago de la Lernejo, Esperantologia Konferenco kaj Internacia Kongresa Universitato. Timoj, ke mankus kvorumo en la Komitato, feliĉe ne realiĝis.

La teatra programo ĉerpis sian forton el la granda kontribuo de la konata pola aktorino Jadwiga Gibczynska, sed ĝenerale la arta programo suferis pro la financaj limoj, kiuj malhelpis la alvenon de aliaj bonaj internaciaj artistoj. Pro la granda natura beleco de la kongreslando, tiuj, kiuj venis al la UK pro ĉefe turismaj celoj, ne devis esti seniluziigitaj: du unusemajnaj postkongresaj ekskursoj estis elvenditaj, kaj dumkongresaj ekskursoj okazis tra la tuta semajno.

2. Spezoj: Tiom malgranda kongreso en relative altekosta lando kaŭzis grandan riskon de deficito. Ankoraŭ ne eblis definitive saldi la kontojn, sed la perspektivo estas nun kuraĝiga. La fakto, ke ni serioze frontis la riskon de deficito, emfazis kaj daŭre emfazas la neceson tre zorge konsideri niajn estontajn kongresajn landojn, ĉar la Propaganda Konto dependas ĉefe de la financa sukceso de la UK.

3. La 21a Internacia Infana Kongreseto: 6 infanoj el 3 landoj partoprenis en la IIK, kiu okazis en aparta ejo en la kongresejo mem.



Kelkaj anoj de la vankuvera Loka Kongresa Komitato paŭzas dum unu el la multaj preparkunsidoj

4. La 40a Internacia Junulara Kongreso: Ĝi okazis dum la semajno antaŭ la UK en Swanwick, Britio. Vidu apartan raporton en la ĉapitro 11.

5. Estontaj kongresoj: Pro la decido kongresi en Pekino en 1986 kaj en Varsovio en 1987, ni estas en jardeko, kiu inkluzivos kongresojn en Sud-Ameriko (1981), Nord-Ameriko (1984), Ĉinio (1986) kaj, dufoje, en orienta Eŭropo (1983 kaj 1987). Kontraste, la UK en Aŭgsburgo estos inter la tradicilokaj kongresoj; ĝi donos al la Asocio specon de paŭzo antaŭ la triafoja novaĵo de neprovita kongreslando kaj la posta jubilea kongreso. Preparoj en Aŭgsburgo bone progresas sub la gvido de forta organiza komi-

tato; la perspektivo pri 2 000 kongresanoj estas realigebla. Pri la jaroj post 1987, bedaŭrinde malaktualiĝis la invito por 1988, sed estas tri por 1989. Krome, oni esploras la eblecon okazigi en Eŭropo grandan aranĝon, kun ĉefe turisma aspekto, en tiuj jaroj, kiam okazas ekstereŭropa UK. Por 1986 oni havas tiajn invitojn por Nederlando kaj Ĉeĥoslovakio.

8. JUBILEA JARO, INFORMADO

1. Centjara Jubileo: Jam de kelkaj jaroj okazas tre vasta agado, kies celo estas kiel eble plej digne omaĝi la Centjaran Jubileon de Esperanto en 1987. Pri tio aperis ampleksa superrigardo en *Esperanto* de aprilo 1985. La preparojn por la Jubileo karakterizas maksimumaj vasteco kaj demokrateco de la agado, tiel ke ĉiu landa kaj faka asocio, multaj lokaj grupoj kaj miloj da unuopaj esperantistoj komencas havi siajn proprajn planojn kaj strebojn lige al la Jubileo. UEA limigas sian rolon ĉi-rilate al tiuj kampoj (kaj investoj), por kiuj lokaj aŭ landaj rimedoj, homaj kaj monaj, ne sufiĉas. Tio, ekzemple, koncernas gravajn libroeldonojn (la aperinta *Esperanta antologio* kaj la prilaborataj *Nova Esperanta krestomatio*, nova *Enciklopedio de Esperanto*, antologio de la Esperanta prozo). Same, UEA preparas modernan, porteblan (kaj aĉeteblan) ĝeneralan ekspozicion, kunordigas preparojn por konsistigi imponan Internacian Patronan Komitaton, projektas plurajn sciencajn konferencojn, artajn festivalojn, preparas la jubilean Kongreson en Varsovio ktp. Kiel ni jam pli frue diris en ĉi tiu revuo, UEA volas, ke ni okaze de la Jubileo pli laboru ol festu. Tial ankaŭ la grandega laboro, kiu nun okazas en Afriko kaj en kelkaj aziaj landoj apartenas al la preparoj por la Jubileo. Eĉ la vastigo kaj modernigo de la sidejo de UEA en Roterdamo estas jubilea preparo. Kvankam la jubileaj laboroj sentiĝas en ĉiu aspekto de la asocia vivo, nenie ili tiel klare evidentas kiel sur la kampo de la informado. Multo, se ne la tuto, de la nuna laboro pri informado estas preparoj por la Jubileo.

2. Komisiono pri Informado: Rezulte de la diskutoj dum la 69a UK en Vankuvero, la Komisiono proponis al la Komitato kvin prioritatojn: 1) inviti ĉiujn informajn fakojn de la landaj asocioj aliĝi al la Informa Reto; 2) organizi Seminarion pri Informado en la kadro de la venontaj Kongresoj (tia seminario okazos en Aŭgsburgo); 3) instali teletajpilon en la CO de UEA; 4) regule aperigadi en la revuo *Esperanto* artikolojn pri enlandaj informaj laboroj; 5) eldoni la bazan faldfolion pri Esperanto.

3. Kongresa informado: Kvankam la 69a UK en Vankuvero viciĝis inter la malgrandajn Kongresojn kaj okazis en specifaj cirkonstancoj, ĝia reeĥo en la lokaj amaskomunikiloj estis granda kaj pozitiva (vidu la antaŭan ĉapitron).

4. Landaj informaj fakoj: La ĉefa parto de la informa laboro pri Esperanto normale okazas je la landa nivelo, en la nacia lingvo. UEA mem plenumas tiun rolon rekte nur en la landoj kaj regionoj, kie mankas organizita loka Movado, kiel ekz. en Afriko, en arabaj landoj, en kelkaj landoj de Azio kaj Sud-Ameriko (vidu la ĉapitron 12). Ni povus esti tiurilate kontentaj pri la informa laboro en multaj landoj: Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉinio, Finnlando, Francio, FR Germanio, Germana DR, Hungario, Italio, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Korea Respubliko, Kubo, Norvegio, Pollando, Svedio, Usono, Venezuelo. Detalojn oni trovas en preskaŭ ĉiu numero de *Esperanto*.

5. Aliaj informaj laboroj: En 1984 aperis la jubilea afiŝo, kiun kelkaj landoj komencis vaste kaj sukcese utiligi (Italio, Jugoslavio). Ankaŭ la jubilea simbolo komencis vaste uziĝi, ĉar iom post iom la esperantistaro malkovras ĝiajn elegantecon kaj trafecon, kiuj sen akompana teksto aŭ slogano ne estas tre elokventaj. Aperis krome pliaj okazaj, bone utiligeblaj afiŝoj, ĉu de UEA mem, ĉu de landaj asocioj. Internacia Gazetara Servo produktis kelkajn novaĵbultenojn en Esperanto, la angla kaj franca, kvankam montriĝas ĉiam pli klare, ke tia novaĵdistribuo fariĝis malrapida kaj malmoderna, kio estas plia argumento favore al instalo de teletajpilo en la CO. Dum unuflanke la preĝigo de nova baza faldfolio malrapide progresis, produktiĝis ampleksa baza informlibra manuskripto pri la plej diversaj aspektoj de la Internacia Lingvo. Temas pri la verko *La fenomeno Esperanto*, kiun UEA mendis ĉe William Auld. En la unuaj monatoj de 1985 komentis la manuskripton kvin elektitaj recenzantoj, tiel ke la polurita teksto aperos fine de la jaro, por antaŭ la Jubileo esti tradukita kaj aperi en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj. Tio estas la ĉefa celo de ĉi tiu granda informa projekto. Interesitaj landaj asocioj aŭ aliaj instancoj bonvolu ĉi-rilate skribi al la Centra Oficejo, kiu jam havas kvar tiajn petojn.

6. Konkludo: Ju pli proksimiĝas la Centjara Jubileo, ne nur de la Internacia Lingvo mem sed ankaŭ de nia strebado al la komunika egalrajteco kaj amikeco inter la popoloj de la mondo, des pli graviĝas nia mesaĝo al tiu mondo, des pli multe ni havas por diri al la ĝenerala publiko, des pli tiu publiko pretas aŭskulti kaj vidi nin, legi pri ni. Ni havas belajn ekzemplojn el plej diversaj landoj, ke la "obstinaj muroj" de la centjara indiferento pri la demando de komuna internacia komunikilo iom post iom disfalas, kaj ke trafaj argumentoj, prezentitaj laŭ la preskriboj de la moderna informa industrio, sukcesas kaj portas rikolton. Iniciatoj povas el la financaj aldonaĵoj al ĉi tiu Raporto legi, ke en 1984 UEA elspezis pli ol 100 000 guldenojn por la diversaj informaj projektoj. Tiu financa bazo ne malkreskos en la venontaj jaroj, sed ĝin devas akom-

pani ankoraŭ pli da trafaj informa laboro kaj kunlaboro.



Grandan informan eĥon povas havi la Universala Kongreso. LKK-ano Jean Fremont donas intervjuon al raportisto en Vankuvero

9. EKSTERAJ RILATOJ

1. Unuiĝintaj Nacioj: El administra vidpunkto la jaro 1984 estis malfacila por la Novjorka Oficejo de UEA. La lukontrakto pri la oficeja ĉambro, jam de kelkaj jaroj okupata, finiĝis en aprilo. Ni trovis ĉambron aliloke en la konstruaĵo, sed post kelkaj monatoj ankaŭ ĝi ne plu disponeblis. La Oficejo nun dividas ĉambron kun kelkaj aliaj organizaĵoj, kaj havas aliron al aparta kunsido por kunvenoj aŭ kursoj. Tio ebligas konsiderindan ŝparon kaj ne bremsas la laboron. Tiun laboron gvidas okmembra estraro, kiu kunsidas unufoje monate sub prezido de d-ro H. Tonkin. Direktoro de la oficejo estas s-ino Nancee Medrano. Ŝi transprenis tiun rolon en aŭgusto de d-ro Alexander Lehrman, kiu posteniĝis en la Universitato Yale.

Pluraj volontuloj, aldone al la estraranoj, laboris regule en la oficejo, reprezentis UEA en oficialaj kunvenoj kaj helpis en organizado de kursoj. Inter la pluraj komitatoj, en kiuj UEA estis reprezentita, menciindas la Komitato de Neregistaraj Organizaĵoj pri la Internacia Junulara Jaro. La Asocio intime kunlaboras en "Young Unispace", projekto de internacia komputila reto, kiu estos alirebla de gejunuloj kaj kies du lingvoj estos la angla kaj Esperanto. La projekto estas aŭspiciata de la Organizo de UN pri Industria Evoluigo.

La tradicia novjorka akcepto de UEA okaze de Zamenhof-Tago estis la 14an de decembro. Ĉeestis i.a. la ambasadoro de Pollando kaj multaj aliaj gastoj kaj amikoj de la Asocio kaj partoprenintoj en la konferenco de CED, kiu okazis en la sama tago (vidu ĉapitron 14).

S-ino Medrano enkondukis plurajn administrajn reformojn en la oficejo por faciligi kaj reguligi la laboron, kiu estis iom perturbita de la translokiĝoj. Denove komencis regule aperi la Novaĵletero de la oficejo, kaj ĝustatempe por la UK aperis la jarraporto. En la kongresejo de la UK pendis ekspozicio pri la UN-laboro, kaj inter la kongresaj dokumentoj troviĝis informilo pri la oficejo kaj Esperanta prospekto de la Universitato pri Paco, kiu eklaboris en Kostariko sub aŭspicio de UN, kaj en kies Novjorka Kunordiga Komitato membras ankaŭ UEA. Dum la kongreso, la kunsido pri UN-agado aparte festis la 30an datrevenon de la Unesko-rezolucio de Montevideo. Parolis s-ro Ralph Harry, iama aŭstralia ambasadoro ĉe UN.

Daŭre reprezentis UEA ĉe UN en Vieno d-ro Hans-Michael Maitzen, kaj nove eklaboris kiel UEA-representanto ĉe UN/Genevo d-ro György Nanovszky. La bulteno *UN kaj ni* regule aperis sub la diligenta kaj trafa redaktado de s-ino Akiko Woesink-Nagata.

2. Unesko: La pariza grupo (Chicot, Despiney, Guérout) pligrandiĝis pro aliĝo de s-ino Armelle Le Puil. Ĝi kunvenas unufoje monate ĉe Unuiĝo Franca por Esperanto, sub la gvido de s-ro Chicot. La laboro ĉe Unesko konsistas el regulaj partoprenoj kaj diskutoj kadre de laborgrupoj kaj seminarioj. De post la lasta konferenco de NRO-j (junio 1984), UEA ne plu estas membro de ties Konstanta Komitato (post du sinsekvaj mandatoj), sed ĝi vigle partoprenas en la laboroj de kvin laborgrupoj pri: junularo, virinoj, komunikado, homrajtoj, edukado pri la paco kaj interkompreniĝo. Cetere, la laborgrupon pri junularo UEA prezidas. Plie, Elisabeth Schwarzer (TEJO) kaj Barbara Despiney reprezentos la Asocion dum Unesko-kongreso dediĉita al la junularo (Barcelono, 8-15a de julio 1985). La partopreno en la laborgrupo pri virinoj celas preparon de Virina Forumo en Najrobo (ankaŭ julie 1985), kien UEA sendos reprezentantojn (tamen, sen kostoj por la Asocio).

La projekto de komuna UEA/Unesko-konferenco de specialistoj pri la lingva dimensio de la komunikado progresas. Oktobre okazis preparkunveno en Parizo, sub la gvido de M. Masmoudi kaj en la ĉeesto de kelkaj eminentaj parizaj lingvistoj (i.a. L.-J. Calvet) kaj reprezentantoj de la NRO-j de tradukistoj kaj interpretistoj. Oni tie proponis definitivan temon: "Plurlingvismo kaj komunikado" (kun tri subtemoj: plurlingvismo je nacia nivelo, plurlin-

gvismo je internacia nivelo, teknologia estonteco). La konferenco okazos de la 12a ĝis la 15a de aŭgusto 1985 en la sidejo de Unesko en Parizo. Unesko subvencias ĝin per la sumo de 5 000 usonaj dolaroj.

3. Aliaj interŝtataj organizoj: Ni daŭrigas la kontaktojn kun ALECSO (araba ekvivalento de Unesko) dank' al ambasadoro M. Masmoudi. La ideo de komuna seminario progresas. UEA starigis unuajn kontaktojn kun arabaj neregistaraj organizoj (Monda Islama Ligo kaj Asocio de Arabaj Instruistoj), por havi ilian helpon pri la planata seminario. Esploroj estas farataj por starigi unuajn kontaktojn kun Interparlamentara Unio en Genevo kaj Internacia Organizo de Civila Aviado en Montrealo.

Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj ĝia sekretario Eŭropa Esperanto-Centro (EEC) en Bruselo havis en 1984 viglan laboraron, kvankam la rezultoj de la granda informa agado ne estas ĉiam facile konstateblaj. Post la balotoj por Eŭropa Parlamento, meze de la jaro, necesis refari plurajn kontaktojn kaj altiri novajn parlamentanojn al Eŭropa Parlamento E-Grupo, kiu nun nombras 37 membrojn. La grupon gvidas la parlamentano H.J. Seeler (FR Germanio). Dum kunsido en Kassel, en aprilo 1984, s-ino Maria Pontika (Greklando) estis reelektita kiel prezidanto de EEU, kaj la taskojn de EEC daŭre prizorgas Anne Tilmont. Restas la malnova problemo de nesolvita financa bazo de EEC, kiun de jaroj finansas UEA kaj Flandra E-Ligo, per tolero de granda ŝuldo de la Centro, sen bonaj perspektivoj por foja repago.

4. Nacia agado: Kiel en la pasintaj kelkaj jaroj, okazas tre vigla enlanda klopodo kunlabori kun la plej diversaj ekstermovadaj instancoj. Nova lando tiurilate estas Aŭstralio, pri kio plurfoje raportis ĉi tiu revuo. Bona kunlaboro kun la diversaj sociaj organizoj okazas ankaŭ en Bulgario, Hungario, Japanio, Korea Respubliko, Ĉinio, Jugoslavio, Finnlando, Norvegio ktp. Pro la Kongreso en Aŭgsburgo ankaŭ la instancoj en FR Germanio komencis denove uzi Esperanton por siaj oficialaj eldonaĵoj (prospektoj, afiŝoj ks.).

10. KULTURO KAJ EDUKADO

1. Kultur-bildoj: La projekto, bazita sur komitata decido de 1982, estas minacata de manko de kunlaborantoj. Malgraŭ artikoloj kaj diversaj mencioj en la revuo *Esperanto* kaj rektaj kontaktoj fare de la estraro pri kulturo kun diversaj homoj, kunlabora preteco montriĝis nekonsiderinda. Aperis en *Kontakto* (1984:4) la kultur-bildo pri Islando kiel specimeno, kun instigoj al komentoj kaj kunlaboro en la projekto. Manuskripte estas nun pretaj jenaj kultur-bildoj: Feroaj Insuloj, Hungario, Tajvano kaj Provenco.

2. Fondaĵo Antoni Grabowski: En tiu ĉi jaro por la unua fojo UEA donis premiojn el nova kultura fonduso, portanta la nomon de unu el la pioniroj de la Esperanta kulturo, Antoni Grabowski. Ĝi estis fondita per regularo en januaro 1983, surbaze de mondonaco de s-ro Adam Goralski Pavlikovski. La celo de la fonduso estas subteni la Esperantan kulturon. Premiojn el la fonduso por 1984 ricevis d-rino Marjorie Boulton, s-ro Fernando de Diego kaj d-ro W.A. Verloren van Themaat, ĉiuj pro valoraj kontribuoj sur la tereno de la literaturo. Dank' al la varbado de s-ro Goralski mem la fondaĵo daŭre pligrandigas sian kapitalon.

3. Tago de la Lernejo: En Vankuvero ĝi okazis por la tria fojo sub prezido de d-ro Duncan Charters. La ĉeftemo de la Tago estis "La edukado de Esperanto-instruistoj kaj kursgvidantoj". La programo konsistis – kiel kutime – el prelegoj, prezento de instrumentoj (ĉi-foje per vidbendo) kaj diskutoj. (Plena raporto pri la Tago aperis en *Esperanto*, oktobro 1984.)

4. Ekzamenoj: La Internaciaj Ekzamenoj de UEA ne povis okazi dum la 69a UK, kiel planite, pro organizaj malhelpoj. Espereble, ili okazos dum la 70a UK. Lokaj reprezentantoj estas jam akiritaj en diversaj landoj.

5. Diskutoj kaj proponoj en Vankuvero: La Komisiono pri Edukado kaj la Komisiono pri Planado, en kunlaboro dum la 69a UK, vaste traktis edukajn demandojn. El tiuj diskutoj rezultis diversaj proponoj kaj sekvaj decidoj, kiuj atendas plenumon:

- a. fondi Filмотекон de UEA, kiu kolektu kaj savu malnovajn – kaj novajn – Esperantajn filmojn, fari-tajn de grupoj kaj individuoj, kaj kiu starigu vidben-dan reton de diversaj programoj disponeblaj;
- b. daŭrigi la laboron por fiksi normojn de la Esperanto-instruado;
- c. kolekti kaj disvastigi informojn pri metodoj uzataj en la universitata instruado de Esperanto;
- ĉ. publikigi la plej elstarajn prelegojn de la Lerneja Tago;
- d. organizi en Pekino, antaŭ la 71a UK tie en 1986, pedagogian seminarion.

La Komisiono pri Edukado faris ankaŭ proponojn por konsidero pri jenaj temoj:



- a) neceso organizi internaciajn pedagogiajn kursojn, kun la celo prepari kadron por la instruado al la estontaj Esperanto-instruistoj en landoj, kie tiaj kursoj ne okazas;
- b) eldono de metodikaj materialoj por Esperanto-instruistoj;
- c) organizo de unusemajna kunveno de kelkpersona faka grupo de metodikistoj, por eldiskuti kaj prilabori kolektivajn materialojn kaj la necesajn dokumentojn rilate la unuecigon de la postuloj ĉe pedagogiaj/

metodikaj kursoj por estontaj Esperanto-instruistoj kaj ĉe la ekzamena demandaro;

ĉ) bezono de eldonado de faka bulteno aŭ revuo kun informa kaj eduka celoj, kiu enhavu, krom informoj pri metodikaj internaciaj aranĝoj, ankaŭ raportojn pri metodikaj spertoj, pri modernaj tendencoj en la lingvo-instruado, skizojn de modellecionoj k.s.

6. Eduka Fondaĵo Carson: En la 69a UK en Vankuvero okazis inaŭgura solenaĵo de Eduka Fondaĵo Carson, kies baza kapitalo fariĝis granda donaco (70 000 kanadaj dolaroj) de s-ro William Carson. La fondaĵo povas montriĝi internacie grava pro siaj planoj subvencii interesajn edukajn projektojn ankaŭ ekster Kanado. La unuaj subvencioj estos disdonitaj en 1985.

7. Eldonado: Pri la eldona agado de UEA mem en 1984 vidu la ĉapitrojn 3 kaj 13. Aliaj gravaj eldonejoj de Esperantaj libroj restas Ĉina Esperanto-Eldonejo, Hungara Esperanto-Asocio, Sarlanda Esperanto-Ligo, Japana Esperanta Librokooperativo kaj Japano Esperanto-Instituto. Lastatempe vigliĝas la eldona agado ankaŭ en Aŭstrio, Brazilo, Francio, Jugoslavio kaj Svedio. Ŝajnas, ke ankaŭ la librovendado estas kontentiga, ĉar la Libroservo de UEA pasintjare notis rekordan sumon de la vendoj.



Prezidis TEJO dum 1984 I. Jackson, kiu transprenis la dekstre). La cetera teamo estas (supre de maldekstre) Humet, (sube de maldekstre) E. Schwarzer, J. Koszmarska, la estrarano de UEA pri junularo), A. Staes, Zs. Kórházi.

11. JUNULARA SEKCIO



(Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)

1. Enkonduko: La agado de TEJO en 1984 karakterizis la preparoj por Internacia Junulara Jaro (IJJ) 1985. La decido de UN dediĉi jaron al la junularo donas al TEJO bonegan okazon por pli varbi, informi, kunlabori, sin prezenti. Sukcesa Internacia Junulara Kongreso (IJK) kaj realigo de pluraj planitaĵoj ĉirkaŭas la pozitivan bilancon de 1984.

2. Komitato: La Komitato kunsidis dum la UK en Swanwick. Tiu supera organo de TEJO nun konsistas el 51 personoj: 38 A-komitatoj (nomitaj de la landaj kaj faka sekcioj), 7 B-komitatoj (elektitaj de la A-komitatoj) kaj 6 C-komitatoj (estranaroj ne jam komitatoj A aŭ B).

Por plenumi difinitajn taskojn, la Komitato starigas komisionojn, kiuj laboras dum la tuta jaro. Nun funkcias 5 komisionoj: Aktivula Trejnado (gvidas Jan Koszmaluk, Pollando), Eksteraj Rilatoj (Martin Haase kaj Elisabeth Schwarzer, ambaŭ el FR Germanio), Faka kaj Scienca Agado (Zsófia Kóródy Barossné, Hungario), Landa Agado (Marie Vančurová, Ĉeĥoslovakio, pri Eŭropo; Neven Kovačić, Jugoslavio, pri ekstereŭropaj landoj), Organiza Strukturo (Ian Jackson, Britio). La iama Komisiono pri IJK

Fotoj: S. MacGill



on en 1983 de A. Wandel (supre
M. Haase, M. Vančurová, A.
N. Kovačić (kun B. Despiney,
kaj N. Saletti.

ensorbiĝis en tiun pri Aktivula Trejnado. Aparte funkcias la komuna komisiono de TEJO/UEA pri IJJ (gvidas Norberto Saletti, Italio).

3. Estraro: La Estraro de TEJO kunsidis kadre de la 40a IJK kaj en januaro 1985 en Prago (Ĉeĥoslovakio), okaze de formala kunveno kun Internacia Unuiĝo de Studentoj. Pliaj neformalaj kunvenoj de estraranoj okazis kadre de aliaj manifestacioj. Pro la demisio de André Staes, oni devis nomi novan kasis-ton, kaj elektiĝis Alex Humet (kataluno loĝanta en Belgio). Eniris la Estraron ankaŭ Elisabeth Schwarzer, kiu okupiĝas pri seminarioj.

4. Membraro: Dum la individua membraro de TEJO restis pli-malpli ĉe la ciferoj de 1983, la aligita membraro signife kreskis. Malkreskis la nombro de la Patronoj de TEJO. Vidu detalojn en la ĉapitro 3.

5. Servoj: La ĉefa estas Pasporta Servo de TEJO, kiu famiĝas ankaŭ ekstermovade. La broŝuroj pliampleksiĝas de jaro al jaro, tiel rilate la nombron de la reprezentataj landoj, kiel la nombron de gastigantoj: jam ĉ. 700 en pli ol 60 landoj. Bone sukcesis ankaŭ la labortendara katalogo.

6. Eldonaĵoj: Bone disvolviĝis la eldonplano pri *Kontakto*, pri kio vidu en la ĉapitro 6. *TEJO tutmonde*, post la demisio de Paul S. Hopkins (Kanado), trovis novan redaktoron en Andy Künzli (Svislando), kiu prizorgas la aperigon de tiu dumonata ligilo inter la TEJO-membroj. La oficiala organo de la Organizo, "TEJO-paĝo" en la revuo *Esperanto*, aperis sepfoje en 1984.

7. Kongresoj: La 40a IJK, en Swanwick (Britio), de la 13a ĝis la 20a de julio 1984, spertis iom da problemoj pro la neceso ŝanĝi la datojn, por ne samtempi kun la 69a UK en Vankuvero. Malgraŭ tio, pli ol 300 gejunuloj el 35 landoj partoprenis la Kongreson.

La 41a IJK okazos de la 22a ĝis la 29a de julio 1985 en Eringerfeld (FR Germanio), kun la temo "Junulo inter revo, ribelo kaj rezignacio", ligita al IJJ-temaro. La 42a IJK okazos meze de aŭgusto 1986 apud Tel Aviv (Israelo); ĝia temo eble rilatos al Internacia Jaro de Paco 1986. Jam ekzistas invito de Pola Esperanto-Junularo por 1987. Rilate la Kongreson de 1988, nun estas esplorataj eblecoj.

8. Eksteraj rilatoj: Kvankam malmultaj aktivuloj devas prizorgi ĉi tiun vastiĝantan laborkampon, la jaro 1984 karakteriziĝas sukcesa por la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO. De januaro ĝis septembro Graham Cansdale volontule laboris partatempe por KER en la CO. En septembro Peter Barclay transprenis tiun taskon. (Vidu ankaŭ la ĉapitron 3). La volontuloj estis parte pagataj el administra subvencio, kiun Eŭropa Junulara Fondaĵo (EJF), instanco de Eŭropa Konsilio, en 1984 denove pagis al TEJO. Tiu instanco subvenciis ankaŭ la KER-seminaron pri "Neperforta solvado de konfliktoj",

sukcese organizitan de la 18a ĝis la 23a de aprilo en Rimini (Italio). Alia subvenciita seminario, kiu estis antaŭvidita por 1984 en Hungario, pri la temo "Koo-perativoj", devis esti ŝovita al 1985 pro organizaj problemoj. Ĝi do okazos de la 22a ĝis la 29a de septembro en Tuzla (Jugoslavio). Por certigi bonan kunlaboron kun la lokaj organizantoj, M. Haase vojaĝis al la seminarilando komence de septembro, sekve de invito de la landa sekcio. Kun la celo dediĉi pli da atento al tiu ĉi faceto de la agado de KER, la Komitato alektis E. Schwarzer en la Estraron. Ŝi do, kun M. Haase, gvidas KER.

La nacilingva bulteno *News/Nouvelles/Noticias* ne eldoniĝis en 1984. KER eldonis la raporton *Lingvo kaj komunikado*, kiu estas kolekto de bazaj tekstoj pri la lingva flanko de komunikado, kaj en preparo estas la raporto *Enŝaltiĝo al informretoj*.

La membreco de TEJO en Eŭropa Kunordiga Buroo (EKB) de internaciaj junularaj organizoj montriĝis efika kontaktilo kun aliaj organizoj kaj instancoj. TEJO partoprenis kunsidon de ĝia plenumkomitato kaj la plimulton de ĝiaj alispecaj aranĝoj (seminarioj, trejnaj kursoj k.s.). TEJO aparte atentiĝis okaze de ekspozicieto de EKB por eŭropaj parlamentanoj. KER peris partoprenon en lingvaj kaj trejnaj kursoj de Eŭropa Junulara Centro (Strasburgo, Francio). Bedaŭrinde, la movada intereso pri tiuj aranĝoj (en la angla kaj franca) ne estas tre granda.

Laŭ tiurilata komitata rezolucio, TEJO zorge preparas sian partoprenon en la 12a Monda Festivalo Junulara kaj Studenta, en Moskvo (27a de julio – 3a de aŭgusto 1985), pri kio respondecas d-rino M. Vanĉurová.

Niajn rilatojn kun la sistemo de UN karakterizis la preparoj por IJJ. Kadre de la pasintjaraj Unesko-konsultiĝoj, TEJO/UEA iniciatis kaj akceptigis rezolucion pri IJJ. Parte pro tio ĝi elektiĝis kunprezidanto de konstanta preparkomitato por diskuta sesio pri IJJ. Nia reprezentanto en Parizo estas d-rino B. Despiney. Pro malfruaj invitoj, TEJO sukcesis partopreni en nur unu el la tri sesioj de Ĝeneva Neformala Kunveno de internaciaj neregistaraj junularaj organizoj (ĜNK).

Kvankam la komuna komisiono de UEA kaj TEJO pri IJJ ne povis kunveni en plena konsisto dum 1984, ĝi ja sukcesis plenumi sian laborplanon: interalie, N. Saletti preparis tekston pri la historio de TEJO, eldonotan okaze de IJJ, B. Despiney antaŭenigis la preparojn ĉe Unesko (vidu supre), kaj M. Haase respondis plurajn tiurilatajn demandilojn.

Dum 1984 bone funkciis la labortendara agado de KER, interalie Turka Volontula Junulara Organizo mendis Esperanto-instruistojn por venontjaraj labortendaroj en Turkio, kun la celo krei tie kernon de Esperanto-junularo. Informojn pri labortendaroj kolektis S. Hideg (Hungario).

Granda sukceso de la KER-agado en 1984 estis la intensigo de kontaktoj kun Internacia Unuiĝo de Studentoj (IUS): TEJO gastigis IUS-sekretarion F. Mekhdad (Sirio) dum la 40a IJK, kion IUS reciprokis per invito de la tuta Estraro al Prago (vidu ĉi-ĉapitre sub 3).

9. Landa agado: En 1985 aperos ampleksa raporto pri la landa agado de TEJO. La Komitato akceptis en Swanwick la aliĝpeton de Junularo Esperantista Svislanda (JES). Stariĝis rilatoj kun grupo de gejunuloj en Danlando. Tre kontentige progresas la agado en pluraj landoj: Koreio, FR Germanio, Hungario, Japanio.

10. Aktivula trejnado: Dum la 40a IJK la Komitato starigis komisionon, kiu prilaboru modelojn por transdonadi spertojn de unu generacio de gvidantoj al alia, por ke kapabloj, ideoj, agadmanieroj ne perdiĝu. La komisiono organizis plurajn seminariojn, en kiuj pretiĝis multa materialo, ekz. ĝisdatigo de la broŝuro *Kiel organizi IJK?*

11. Scienca kaj faka agado: La koncerna komisiono aktivis ĉefe en la mediprotekta kampo. Ĝiaj membroj partoprenis plurajn konferencojn, el kiuj ni menciis la seminarion en FR Germanio pri "Medio ne konas limojn", kies oficialaj lingvoj estis la germana kaj Esperanto. Okazis ankaŭ alia konferencserio samteme tra Eŭropo. En la 40a IJK funkciis laborgrupo pri mediprotektado, kiun sekvis starigo de Koresponda Komisiono, kiu plulaboras pri tiu temo.

12. Konkludoj: Kiel ni diris en la enkonduko, 1985 estas Internacia Junulara Jaro, kaj TEJO jam en 1983 iniciatis sian laboron por bone profiti tiun okazon por disvastigi Esperanton en junularaj medioj. Por sia agado TEJO nepre bezonas aktivan kunlaboradon de UEA, ĉar temas pri du asocioj kun sama celo, sed kun malsamaj celgrupoj. TEJO iniciatis diskutojn cele al reformo de sia interna strukturo, por ĝin adapti al la rapide ŝanĝiĝanta ekstera mondo, kiun ni celas informi pri nia lingvo kaj pri ĝia pacema fono. TEJO pli kaj pli pravas la kapablon sin prezenti al la ekstera publiko kiel asocio, kiu havas ion por diri ne nur rilate la lingvan problemon, sed ankaŭ rilate la plibonigon de la vivkondiĉoj sur nia planedo.

12. LANDA KAJ REGIONA AGADO

1. Aliĝintaj landaj asocioj: Kvankam en 1984 okazis pluraj provoj levi la kontaktojn kun la aliĝintaj landaj asocioj je iu pli alta nivelo, ol estas la kutimaj "cirkuleraĵoj", ni ankoraŭ ne povas kontenti pri la intenseco de la informado inter la landaj organizaĵoj kaj UEA. Okazas malofte, ke landa asocio skribas al UEA kaj petas helpon pri iu specifa problemo, kies solvon eble jam trovis alia landa asocio, kaj pri kio estas informita aŭ alimaniere povus helpi UEA. Kelkaj tiaj problemoj leviĝis dum la pasintjaraj vizitoj de estraranoj aŭ oficistoj de UEA al Ĉinio, Pollando,

Brazilo, Kanado, Usono, Korea Respubliko, Bulgario kaj Hungario. Oni kune serĉis solvon – kaj trovis ĝin aŭ survojas al ĝi. Sendube estus bone daŭrigi tian praktikon.

La nombro de la aliĝintaj landaj asocioj ne altiĝis en 1984. Male, fine de la jaro estis klare, ke ĝi eĉ malaltiĝos baldaŭ, pro la deziro de Kultura Kooperativo de Esperantistoj rezigni pri la aliĝinteco favore al Brazila Esperanto-Ligo. Intertempe tia decido okazis (en marto 1985). Ĝi certe estas kontribuo, grava eĉ, al la unuecigo de la brazila Esperanto-movado. Nun Ĉeĥoslovakio restas la sola lando kun du aliĝintaj asocioj en UEA. Supozeble, venos baldaŭ tempo solvi ankaŭ tiun malutilan precedencon.

2. Nealiĝintaj organizaĵoj: Kelkaj landoj kun forta Esperanto-movado ankoraŭ restas ekster UEA:



Per klara rigardo al foraj celoj, Hans Bakker kunordigas la regionan agadon en Afriko

Soveta Unio, Rumanio, Irano. Dum la pasintaj du-tri jaroj la aliĝo de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) ŝajnis tre baldaŭ okazonta: en 1983 oni anoncis, ke tiurilate ŝtata decido jam estis farita; en 1984 efektive venis tia peto kaj ĝi eniris la komitatan tagordon en Vankuvero. Tie tute ne aperis reprezentantoj de ASE kaj la pritrakto de la aliĝpeto prokrastiĝis. La situacio en Rumanio restas neklara. Bonaj kontaktoj inter UEA kaj la tiea Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko ekzistis en 1978/79, en la inaŭguro de la Kongreso en Budapeŝto parolis la rumana ambasadoro, sed ekde tiam la kontaktoj kun la rumana esperantistoj ĉiam pli maloftiĝis, tiel ke la situacio nun estas malklara same kiel antaŭ deko da jaroj. Rumanio tiel restas unike izolita kazo en la internacia Esperantomovado (aŭ fakte ekster ĝi).

Esperanto en Irano restas populara kaj multa agado okazas, kvankam la milita situacio tie malhelpas ankaŭ la Movadon. Restas por admiri, ke en tiaj malfacilaj cirkonstancoj pluraj dekoj da irananoj venkas la grandajn problemojn kaj sukcesas individuaj membri en UEA.

3. Regiona agado: Ĝi koncentriĝas ĉefe al Afriko. Tie nun lernas Esperanton 150 personoj en diversgradaj kursoj (korespondaj kaj surlokaĵoj). Kun Hans Bakker (filo), la ĉefa motoro de tiu agado, diligentas deko da kunlaborantoj. Ĉirkaŭ 80 ĝemeliĝoj, de eksterafrikaj esperantistoj kaj kluboj kun afrikaj lernantoj de la Internacia Lingvo, efike subtenas ĉi tiun unikan entreprenon, kies celo estas definitive krei lokajn kernojn de esperantistoj en Afriko. En pluraj afrikaj landoj tio jam komencas realiĝi: Ebura Bordo, Nigerio, Benino, Ruando (gvidas E. Symoens), Zairio (prizorgas K. Braet), Angolo, Madagaskaro, Reunio, Togo... Ankaŭ la agado en arabaj landoj (gvidas K. Schubert) vigliĝis dum 1984. UEA investis, pere de la Fondaĵo Azio-Afriko, en la pasinta jaro pli ol 30 000 guldenojn en ĉi tiun agadon. Tie kaj jene en la movada gazetaro aperas negativaj opinioj pri la nuna skalo de la regiona agado de UEA. Evidentas, ke tiuj homoj ne scias pri kio ili parolas.

13. FAKA AGADO

1. Scienca Eldona Centro (SEC): En 1984, la kvara jaro ekde sia fondiĝo en 1981, Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto aperigis entute kvin volumojn: *Ĉu vi konas la Teron?* (kvankam kun indiko de 1983 kiel eldonjaro), *Geologio internacia vol.5*, *Radioteknika artikolaro*, *Amuza matematiko kaj Molekuloj*. Kvankam tio unuavide ŝajnas tre riĉa rikolto, montriĝis, ke la intereso de la movada publiko nur parte respondas al la tiurilataj atendoj, ĉar kontentige vendiĝis nur la verko *Ĉu vi konas la Teron?* de E. Dudich.

Tra la jaro okazis pluraj diskutoj en la Estraro kaj kun la laborantoj de SEC en Budapeŝto. Netiĝis labordokumento pri la baza eldonpolitiko de SEC, sed ĝi ne plu povis influi la librojn, kiuj jam estis en la produktoprocezo, kaj kiuj intertempe aperis. La financaj rimedoj, kiujn grandparte generis la 68a UK en Budapeŝto, rapide elĉerpiĝis kaj nun ŝajnas klare, ke la produktokostoj en Budapeŝto estas neatendite altaj, dum la grafika kvalito de la eldonaĵoj estas plejparte nekontentiga. Tial la Estraro en sia kunsido de januaro 1985 decidis serĉi novan organizon formon por SEC kaj komisiis tiurilatajn esplorojn kaj paŝojn al la ĝenerala direktoro de la Asocio.

Ankaŭ dum 1984 SEC estis honorofice gvidata de prof. O. Haszpra, kaj la laborantoj en Budapeŝto estis: A. Lukács (sekretario), s-ino I. Koutny (redaktoro) kaj I. Bujdosó, kiu po du horoj tage sekretariis por Terminologia Sekcio de SEC, kies laboro okazas sub la gvido de d-ro Á. Máthé. Tiu sekcio de SEC faras sukcesajn klopodojn kunordigi la terminologian laboron en la Movado.

SEC kunlaboris ankaŭ en kelkaj aliaj projektoj, kiel ekz. la eldonado de la revuo *Internacia komputado*.

2. Aplikado de Esperanto: La Budapeŝta Oficejo de UEA estis en 1984 forte engaĝita pri la preparoj por Interkibernetik '85, granda nemovada simpozio/kongreso, kiu okazos fine de julio kaj komence de aŭgusto 1985 en la ĉefurbo de Hungario. Krome, la eldonaĵo de SEC *Geologio internacia* estis distribuita (ĉ. mil ekzempleroj) al la partoprenantoj de la 27a Internacia Geologia Kongreso, en Moskvo komence de aŭgusto 1984. La estrarano pri aplikado de Esperanto, inĝ. P. Todorov, kontribuis al la preparoj por la tre sukcesa partopreno de esperantistoj (sub gvido de prof. Ĥ. Marinov) en internacia ekologia konferenco en Bulgario. Rezulte de tio aperis la 420-paĝa volumo *Ekofuturo*. Ankaŭ en Soveta Unio, en Leningrado, okaze de Studenta Scienc-Teknika Konferenco dediĉita al la 150a datreveno de la naskiĝo de la fama rusa kemiisto Mendelejev, oni diskutigis demandojn pri la aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko. En Brno (Ĉeĥoslovakio), komence de septembro okazis la jam tradicia seminario pri apliko de Esperanto kaj eldoniĝis 175-paĝa raporto *AEST 1984*.

Tamen, sendube la plej grava evoluo sur la kampo de la aplikado de Esperanto en 1984 estis la decido de la nederlanda registaro subvencii per pli ol 7 milionoj da guldenoj la projekton DLT (Distribuita Lingvo-Tradukado) de la nederlanda firmao BSO. Tiu ambicia projekto pri aŭtomata tradukado, pere de ponto-lingvo surbaze de Esperanto, intertempe dungis plurajn elstarajn esperantologojn. UEA restas intime ligita al la projekto, i.a. per aparta kontrakto pri kunlaboro en 1985.

Tra la jaro okazis ankaŭ plurfoja pritrakto de la preparoj por aparta simpozio lige al la Ĝenerala Asembleo de Monda Organizo pri Turismo ĉi-jare en Bulgario.

3. Fakaj asocioj: Ne okazis novaj evoluoj rilate la antaŭan iniciaton de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) pri ĝenerala restrukturado de la faka laboro por Esperanto. Al tio verŝajne kontribuis ankaŭ la fakto, ke la Kongreso en Vankuvero estis tro malproksima por la plimulto de la aktivuloj sur ĉi tiu kampo. Tamen, en Vankuvero la Komitato akceptis rezolucion, laŭ kiu UEA koncentru sian atenton al limigita nombro de fakoj, kie jam okazas laboro sed kie mankas adekvata organiza strukturo. Jam okazas klopodoj organizi la komercistojn en la Movado, dum la kampo kiu tra la lastaj jaroj montras la plej grandan vigecon — komputado kaj informadiko — ankoraŭ restas sen adekvata organiza strukturo.

14. ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) estas tiu fako de UEA, kiu okupas sin pri studado kaj dokumentado de mondaj lingvo-problemoj. Ĝi laboras sub gvido de aparta estraro, nomata de la Komitato de UEA.

Direktoro estas d-ro Humphrey Tonkin. En 1984 aldoniĝis nova estrarano, s-ro Ryszard Rokicki (Pollando) okaze de subskribo de kontrakto pri kunlaboro inter CED kaj Akademia Centro Interlingvistika, kiu eldonas por CED la bultenon *Informilo por interlingvistoj*. La informilo estas senpage ricevebla por aktivaj interlingvistoj kaj esplorantoj, kiuj sin turnu al la CO de UEA.

La ĉefa organo de CED, la scienca revuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*, regule aperis en tri numeroj en 1984, eldonata de CED pere de University of Texas Press (Usono). Redaktis ĝin prof. Richard Wood. Vicredaktoro estis prof. Frank Nuessel. Fine de la jaro prof. Wood ekŝiĝis el la redaktoreco kaj d-ro Tonkin fariĝis administra redaktoro ekde la unua numero de 1985. Estas antaŭvidata pli granda emfazo en la paĝoj de la revuo pri internaciaj lingvaj problemoj kaj pli intensa aperigo de tekstoj en la Internacia Lingvo.

La sepa Esperantologia Konferenco de CED okazis dum la UK en Vankuvero. Ĉi-foje ĝi havis du partojn: ĝeneralan kunsidon pri prioritatoj en la evoluigo de esperantologio, kaj prelegserion pri la lingvoj de la mondo, kiun prezentis d-ro John Wells, de la Universitato de Londono. Ĉiuj kunsidoj estis multnombre ĉeestataj.

La Tria Jarkonferenco pri Lingvo kaj Komunikado, la serio de konferencoj organizataj de CED, okazis la 19an de decembro en Novjorko, sub titolo "Lingva planado je internacia nivelo". Ĉeestis iom pli ol 80 specialistoj el Unuiĝintaj Nacioj, Eŭropa Komunumo, la entrepreno BSO, pluraj usonaj universitatoj kaj plej diversaj organizoj neregistaraj, esplorcentroj ktp. Prezidis ĝin s-ino Françoise Cestac, direktoro de la Traduka Servo de UN. Prezitis referaĵojn funkciuloj el la interpreta, traduka kaj lingvoinstrua fakoj ĉe UN, la traduka servo de Eŭropa Komisiono, Usona Asocio de Tradukistoj, Lingva Servo de la Kanada Registaro ktp. Tre pozitive reagis la ĉeestantaj fakuloj, kiuj jam kutimiĝis ĉeesti kaj partopreni tiun jaran aranĝon kaj alte aprezas ĝin. Tri referaĵoj rekte rilatis la Internacian Lingvon kaj estis bone akceptitaj de la publiko. Aperis en eldono de CED la kolektivaj referaĵoj de la Dua Konferenco, plejparte anglalingvaj, en 150-paĝa raporto sub la titolo "Lingva konduto en internaciaj organizoj", kaj estas antaŭvidata por 1985 dua eldono de la raporto de la Unua Konferenco kaj aperigo de la prelegaro de la Tria Konferenco.

Daŭras intensa esperantologia kaj interlingvistika agado ekster la kadro de CED, ekzemple en La Chaux-de-Fonds (Svislando) kaj en Akademia Centro Interlingvistika en Varsovio. En novembro denove okazis konferenco pri Esperanto en la Universitato de Parizo-Vincennes. En decembro esperantologoj kunsidis en la kadro de la jarkonferenco de la

Asocio pri Modernaj Lingvoj (Usono). Denove la jara bibliografio de tiu asocio enhavas ducenton da eroj en aŭ pri Esperanto — verŝajne la plej ampleksa bibliografio pri Esperanto nun aperanta.

15. FINAJ VORTOJ

La ĉapitroj, kiuj antaŭas tiun ĉi, skizis, espereble, la ĉefajn trajtojn el la vivo de UEA dum la jaro 1984. Ni lasos al la komitatanoj kaj aliaj legantoj de la Raporto juĝi – kaj kritiki – la agadon de la Asocio dum la pasinta jaro aŭ ĉi tiun Raporton. Kreiva kritiko jam delonge estas bonvena en UEA, precipe se ĝi apogas sin je faktoj, se ĝi ne nur diras, ke io estas malbona, sed ankaŭ montras la vojon por plibonigi la laboron. Malbonvenaj estas absurdaj asertoj, kiel

ekzemple: "UEA elspezas nenium cendon por la propagando de Esperanto" aŭ "la Propaganda Konto de UEA havis nulan saldon fine de 1984". Ĝuste tiuj du asertoj aperis en landa kaj alia movadaj periodaĵoj, sed la Estraro decidis ne reagi al ili, ĉar la financaj aldonaĵoj de ĉi tiu Raporto facile disblovas tiajn fantaziaĵojn.

Kiel ajn oni verdiktos pri ĉi tiu Raporto, ne eblas el ĝi konkludi, ke la Asocio stagnis dum la pasinta jaro. Tio estas pli ol klara ankaŭ el la spezokonto kaj bilanco, kiuj sekvas ĉi tiun ĉapitron. Feliĉe, ke niaj spezoj kaj havaĵoj tiel oscilas kaj ŝanĝiĝas de jaro al jaro. Ankaŭ tio emfazas la dinamismon kaj junecon de la plej aĝa internacia movada organizaĵo. Tiu dinamismo estas io, kion UEA nepre devas havi du jarojn antaŭ la Jubileo en 1987.

FINANCAJ ALDONAĴOJ AL LA RAPORTO

(Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj)

Spezokonto
de Universala Esperanto-Asocio
por la jaro 1984

KOSTOJ	Buĝeto	Rezulto
Salajroj, malnete	327 000	343 365,69
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	73 000	74 178,98
Volontula servo	5 000	11 111,71
Senimpostaj suplementoj	9 800	11 055,82
Trinkaĵoj	1 500	1 589,82
Kompensoj pro malsano	0	- 11 484,24
Salajroj ktp, nete	416 300	429 817,78
Afranko, nete	19 100	17 478,59
Telefono, telegrafo	8 000	12 770,09
Presaĵoj	11 000	5 680,54
Materialoj	9 000	6 473,91
Riparo kaj prizorgo de maŝinoj ..	9 000	9 752,15
Revizoro	1 400	1 400,00
Administraj kostoj ĝeneralaj ..	11 000	3 007,38
Fotokopiado	5 500	4 415,27
Vendoj/kompensoj	- 2 500	- 1 972,79
Centra Oficejo, nete	71 500	59 005,14
Gasoj, elektro,	11 600	10 573,56
Akvo	500	628,63
Riparo de la domo	2 000	4 106,83
Purigado kaj purigiloj	1 100	920,59
Asekuroj	1 800	881,06
Impostoj je la domo	2 600	3 457,40
Lupagoj por ĉambroj	- 2 600	- 1 557,00
Oficeja domo, nete	17 000	19 011,07
Preskostoj de <i>Esperanto</i>	37 000	38 114,38
Sendokostoj	40 000	47 076,33

Ekspedlaboro	17 000	14 001,83
Grafiko	32 000	22 842,78
Kovertoj	3 000	3 259,24
Anoncoj	- 18 000	- 14 317,38
Esperanto, nete	111 000	110 977,18
Preskostoj de la Jarlibro	22 000	22 000,00
Sendokostoj	13 000	16 221,16
Ekspedlaboro	700	1 970,09
Grafiko	10 000	9 542,00
Kovertoj	1 300	215,00
Anoncoj	- 12 000	- 10 797,86
Jarlibro, nete	35 000	39 150,39
Preskostoj de <i>Kontakto</i>	9 000	8 225,48
Sendokostoj	7 000	6 537,27
Ekspedhelpo	3 000	2 274,50
Grafiko	8 200	10 084,46
Kovertoj	400	82,20
Redakto	5 900	3 082,60
Anoncoj	- 500	- 804,79
Kontakto, nete	33 000	29 481,72
Vojaĝkostoj Estraro de UEA	15 000	21 960,05
Vojaĝkostoj komisionaj ktp. ..	500	1 820,44
Vojaĝkostoj oficejaj	1 000	3 382,60
Vojaĝkostoj Estraro de TEJO	2 200	1 082,00
Vojaĝkostoj kongresaj	14 500	11 615,69
Reprezentaj kostoj	2 000	2 477,26
Vojaĝkostoj ktp.	35 200	42 338,04
Korespondado Estraro de UEA	7 800	6 617,26
Korespondado komisiitoj ktp. ..	2 000	1 200,90
Korespondado Estraro de TEJO	2 200	714,04
Korespondokostoj, entute	12 000	8 532,20
Bankokostoj	3 200	3 600,54
Belartaj Konkursoj	2 400	2 858,44
Diversaj kostoj	400	416,87
Ĝeneralaj kostoj	6 000	6 875,85

Amortizo de la domo: 1 %	2 000	2 250,11
Amortizo de inventaro (CO) 20%	3 000	2 555,62
Amortizo de komputilo: 12,5 %	10 000	12 270,54
Amortizo de la programoj k.a: 20%	30 000	13 207,99
Amortizoj, entute	45 000	30 284,26
Sumo de la kostoj	782 000	775 473,63

RIMEDOJ

	Buĝeto	Rezulto
Kotizoj Membro-Jarlibro	22 400	27 334,24
Kotizoj Membro-Abonanto ...	230 700	211 641,42
Kotizoj MJ-Kontakto	3 900	4 477,33
Kotizoj MA-Kontakto	11 300	9 711,55
Kotizoj, individuaj membroj ..	268 300	253 164,54
Aligitaj membroj UEA	22 100	25 018,78
Aligitaj membroj TEJO	6 900	8 363,07
Simplaj abonoj de <i>Esperanto</i>	10 300	8 319,27
Kolektivaj abonoj <i>Esperanto</i>	7 300	4 932,55
Abonoj kaj vendoj <i>Kontakto</i>	12 000	9 364,09
Kolektivaj abonoj <i>Kontakto</i>	4 500	3 019,62
Societo Zamenhof	30 000	25 982,41
Kotizoj de fakaj organizaĵoj ..	2 600	3 296,96
Kotizoj, entute	364 000	341 461,29
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	10 000	14 065,10
Vendoj de la Libroservo	257 000	282 805,38
Aĉetoj (minus ŝanĝo stokvalora)	- 148 000	- 173 819,28
Libroservo, malnete	109 000	108 986,10
Minus tantiemoj	- 6 000	- 6 645,93
Minus katalogokostoj (kontribuo)	- 13 000	- 12 000,00
Libroservo, nete	90 000	90 340,17
Abonservo, nete	7 000	5 865,66
Grafikaj servoj de CO, nete ..	1 000	1 178,00
Aliaj servoj de CO	0	1 285,03
Diversaj servoj, entute	8 000	8 328,69
de Inventaro pro programado ...	25 000	20 000,00
de Kapitalo Dumvivaj Membroj	24 000	30 460,60
de TEJO/KER pro volontuloj ...	11 000	9 651,31
de Inst. Hodler pro administro ...	0	1 100,00
de Propaganda Konto pro informado	0	5 000,00
de domokonto pro konstruado ..	25 000	30 000,00
de Jubilea Fondaĵo pro laboro ...	0	1 000,00
Kompensoj, entute	85 000	97 211,91
Antverpena oficejo, nete	100 000	23 166,58
Kotizoprocentaĵo 68a UK	46 000	22 473,76
50% de licencpago 39a IJK	4 000	3 500,00
Kongresoj, entute	50 000	25 973,76
Turismaj aranĝoj	35 000	- 2 342,49
Vendo de uzitaj poŝtmarkoj ...	2 500	2 206,43
Rimedo de la antaŭa jaro	500	1 583,38
Kurzogajno neta	0	3 351,33
Diversaj enspezoj	3 000	7 141,14
Rento ricevita	57 000	72 779,98
Rento pagita	- 20 000	- 18 044,69
Rento, nete	37 000	54 735,29
Rimedo, entute	782 000	660 081,44
Negativa saldo	0	115 392,19
Sumo de la rimedoj	782 000	775 473,63

Bilanco

de Universala Esperanto-Asocio

je la 31a de decembro 1984

(por komparo aperas ankaŭ la stato fine de 1983)

	1983	1984
AKTIVAJ		
Kasoj, respondkuponoj	7 841,35	1 990,76
Kurantaj kontoj	217 078,91	34 639,35
Ŝparkontoj kaj deponoj	256 223,91	126 976,08
Nekonverteblaj monrimedoj ..	7 933,73	8 517,26
Monrimedoj likidaj	489 077,90	172 123,45
Akcioj	161 437,70	211 255,00
Obligacioj	398 958,00	390 566,40
Valorpaperoj entute	560 395,70	601 821,40
Ricevotaj rimedoj	122 357,76	49 298,90
Antaŭpagitaj kostoj	15 200,10	28 275,99
Debitoroj	277 674,55	402 432,04
Institucio Hodler '68	115 607,79	156 352,96
Debitoroj ktp. entute	530 840,20	636 359,89
Provizoj libroservaj	213 431,95	291 640,16
Provizoj librokatalogo	—	21 595,05
Presaĵoj, materialoj k.s.	23 845,70	25 674,00
Provizoj entute	237 277,65	338 909,21
Maŝinoj ktp. Roterdamo	12 610,87	10 222,48
Komputilaro Roterdamo	63 232,68	73 543,94
Programaro Roterdamo	75 816,55	52 831,96
Maŝinoj ktp. Roterdamo	151 660,10	136 598,38
Bilanca valoro Antverpeno	87 959,62	154 213,15
Bilanca valoro Novjorko	11 444,24	9 934,63
Garantiaj sumoj	3 030,00	3 030,00
Domo de UEA, Roterdamo ..	121 400,00	222 760,86
Tereno Aspremont	1,00	1,00
Nemoveblaĵoj	124 431,00	225 791,86
Sumo de la aktivoj	2 193 086,41	2 275 751,97

	1983	1984
PASIVAJ		
Rezervo libroserva	7 000,00	—
Rezervo por domrenovigo	44 362,34	—
Rezervo por debitoroj	36 500,00	111 699,57
Kongresa Rez. Fondaĵo	47 347,50	51 840,70
Rezerva Fondaĵo IJK	2 646,50	1 292,19
Rezerva Pensifondaĵo	40 000,00	40 000,00
Rezervoj entute	177 856,34	204 832,46
Antaŭricevitaj rimedoj	60 148,81	74 776,97
Pendantaj spezoj	5 099,03	6 765,73
Pagotaj kostoj	97 316,48	120 148,74
Kreditoroj	638 004,84	653 046,45
Ŝparkontoj de membroj	274 524,67	335 416,82
Kreditoroj entute	912 529,51	988 463,27
Eldona Fondaĵo	7 185,22	7 185,22
Fondaĵo Azio-Afriko	—	—

Fondaĵo Canuto	—	5 785,67
Fondaĵo CED	295,00	—
Fondaĵo Enciklopedio	1 899,47	1 899,47
Fondaĵo Grabowski	40 153,42	60 407,80
Fondaĵo Jubilea Jaro	10 138,38	7 863,70
Fondaĵo Kantoj	6 233,41	13 217,65
Fondaĵo Oficeja Ilaro	30 041,60	—
Fondaĵo TEJO	16 443,28	8 615,80
Fondaĵo TEJO (KER)	17 301,67	25 837,69
Fondaĵo Terminologio	—	15 281,48
Fondaĵo UN/Unesko	—	—
Fondaĵo Universala Ekspozicio ..	25 000,00	25 000,00
Propaganda Konto	70 631,73	51 339,94
Fondaĵoj entute	225 323,18	222 434,42
Kapitalo Dumvivaj Membroj ..	416 328,90	423 245,74
Cetera kapitalo	328 786,76	350 476,83
Saldo de spezokonto	– 30 302,60	–115 392,19
Asocia kapitalo entute	714 813,06	658 330,38
Sumo de la pasivoj	2 193 086,41	2 275 751,97

Evoluo de rezervoj de UEA dum 1984

Rezervo Domrenoviga jarkomence	44 362
Donacoj ktp	39 050
Al konto de konstrulaboroj	– 83 412
Jarfine	0
Rezervo Debitora jarkomence	36 500
Nove rezervita el Kapitala Konto	100 000
Deskriboj	– 24 800
Jarfine	111 700
Kongresa Rezerva Fondaĵo jarkomence	47 347
Enspezoj (68a UK)	6 012
Elspezoj (64a, 66a UK)	– 1 519
Jarfine	51 840
Rezerva Fondaĵo IJK jarkomence	2 647
Elspezoj (37a IJK)	– 1 355
Jarfine	1 292
Pensifondaĵo	40 000
Sumo de la rezervoj	204 832

RIMARKO: Bedaŭrinde nek la raporto de la komitataj revizoroj nek tiu de la profesia revizoro estis ĝustatempe pretaj por aperi ĉi-kune. Tamen, ambaŭ revizioj jam okazis, kaj la Komitato en Aŭgsburgo ja disponos ankaŭ pri tiurilataj dokumentoj. Krome, la Komitato jam ricevis detaligitan version de ĉiuj ĉi tie aperantaj financaj aldonaĵoj de la Raporto.

Evoluo de fondaĵoj de UEA dum 1984

Eldona Fondaĵo	7 185
Fondaĵo Azio-Afriko jarkomence	0
Donacoj kaj subvencioj	30 478
Kostoj dum 1984	– 30 478
Jarfine	0
Fondaĵo Canuto jarkomence	0
Donacoj kaj subvencioj	18 462
Kotizoj kaj aliaj kostoj	– 12 676
Jarfine	5 786
Fondaĵo CED jarkomence	295
Donacoj, subvencioj ktp	13 189
<i>Esperanto-dokumentoj</i> , nete	– 5 041
<i>LPLP</i> ktp	–8 443
Jarfine	0
Fondaĵo Enciklopedio	1 899
Fondaĵo Grabowski jarkomence ... us\$ 15 048	40 153
Donacoj kaj rento ricevataj	us\$ 3 608
Premioj kaj kostoj	– us\$ 1 637
Jarfine	us\$ 17 019 60 408
Fondaĵo Jubilea Jaro jarkomence	10 138
Donacoj	8 456
Elspezoj	– 10 730
Jarfine	7 864
Fondaĵo Kantoj jarkomence	6 233
Donacoj	6 984
Jarfine	13 217
Fondaĵo Oficeja Ilaro jarkomence	30 042
Kontribuo al kostoj de nova komputilo	– 30 042
Jarfine	0
Fondaĵo TEJO jarkomence	16 443
Donacoj kaj patronaj kotizoj	3 280
Elspezoj	– 11 108
Jarfine	8 615
Fondaĵo KER de TEJO	17 302
Subvencioj	40 936
Elspezoj	– 32 400
Jarfine	25 838
Fondaĵo Terminologio	15 282
Fondaĵo UN/UNESKO jarkomence	0
Donacoj	620
Kotizoj NRO kaj elspezoj	– 4 281
Subvencio el Propaganda Konto	3 661
Jarfine	0
Fondaĵo Universala Ekspozicio	25 000
Propaganda Konto jarkomence	70 632
Enspezoj (ĉefe de UK)	35 605
Subvencioj por diversaj agadoj	– 54 897
Jarfine	51 340
Fondaĵoj entute	222 434

Buĝetpropono

de Universala Esperanto-Asocio

por la jaro 1986

KOSTOJ

Salajroj, malnete	330 000
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	70 000
Volontula Servo	5 500
Senimpostaj suplementoj	14 300
Trinkaĵoj	1 500
Malsankompenso	- 500
Salajroj ktp., nete	420 800
Afranko, nete	19 300
Telefono, telegrafo	20 000
Presajoj	8 000
Materialoj	8 000
Riparo kaj prizorgo de maŝinoj	12 000
Revizoro	1 450
Administrataj kostoj ĝenerale	5 000
Fotokopiado, nete	3 000
Centra Oficejo, nete	76 750
Gasoj, elektro, akvo	13 750
Riparo de la domo, purigiloj k.s.	5 200
Impostoj je la domo, asekuro k.s.	5 000
Luo riceveblaj	- 1 000
Oficeja domo, nete	22 950
Preskostoj de <i>Esperanto</i>	40 000
Sendokostoj	49 000
Ekspedlaboro	15 000
Grafiko	24 000
Kovertoj	3 150
Anoncoj	- 12 000
<i>Esperanto</i>, nete	119 150
Preskostoj de la Jarlibro	22 000
Sendokostoj	13 000
Ekspedhelpo	1 000
Grafiko	8 500
Kovertoj	1 500
Anoncoj	- 11 000
Jarlibro, nete	35 000
Preskostoj de <i>Kontakto</i>	7 000
Sendokostoj	4 000
Ekspedhelpo	2 000
Grafiko	8 000
Kovertoj	550
Redakto	3 000
Anoncoj	- 1 000
<i>Kontakto</i>, nete	23 550
Vojaĝkostoj Estraro de UEA	15 000
Vojaĝkostoj komisiitoj ktp.	2 000
Vojaĝkostoj oficejaj	4 000
Vojaĝkostoj Estraro de TEJO	2 600
Vojaĝkostoj kongresaj	10 000
Reprezentaj kostoj	4 000
Vojaĝ- kaj restad-kostoj	37 600

Korespondokostoj Estraro ktp.	11 000
Bankokostoj	4 000
Belartaj Konkursoj	3 000
Diversaj kostoj	1 000
Ĝeneralaj kostoj	8 000
Amortizo de la domo, ĉ. 1%	4 000
Amortizo de la inventaro, ĉ.20%	9 000
Amortizo de la komputilo: 12,5%	10 000
Amortizo de programoj: 20%	20 000
Amortizoj entute	43 000
Sumo de la kostoj	797 800

RIMEDOJ

Kotizoj MG (Membro kun Gvidlibro)	10 000
Kotizoj MJ (Membro kun Jarlibro)	25 000
Kotizoj MA (Membro-Abonanto)	210 000
Kotizoj MJ-K (kun <i>Kontakto</i>)	5 000
Kotizoj MA-K (kun <i>Kontakto</i>)	10 000
Aligitaj membroj de UEA	25 000
Aligitaj membroj de TEJO	8 000
Simplaj abonoj de <i>Esperanto</i>	9 000
Kolektivaj abonoj de <i>Esperanto</i>	5 000
Abonoj kaj vendoj de <i>Kontakto</i>	10 000
Kolektivaj abonoj de <i>Kontakto</i>	3 000
Societo Zamenhof	31 000
Kotizoj de fakaj organizaĵoj	4 000
Kotizoj kaj abonoj	355 000
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	15 000
Libroservo (vendoj, aĉetoj ktp)	119 000
Tantiemoj	- 7 000
Katalogaj kostoj	- 12 000
Libroservo, nete	100 000
Abonservo, nete	6 000
Grafikaj servoj de CO	42 000
Diversaj servoj de CO	6 000
Diversaj servoj	54 000
De Inventaro pro programado	25 000
De Kapitalo Dumvivaj Membroj	33 000
De TEJO/KER pro volontuloj	8 000
De diversaj pro laboroj en CO	11 000
Pro laboroj Jubilea Jaro	15 000
Kompensoj	92 000
Antverpena Oficejo, nete	40 000
Kotizoprocentaĵo 71a UK	43 000
Turismo	20 000
Kongreso kaj turismo	63 000
Diversaj enspezoj	3 500
Rento, nete	30 000
Rimedoj entute	752 500
Negativa saldo	45 300
Sumo de la rimedoj	797 800

FINO DE LA ESTRARA RAPORTO

● **Brazilo:** Post la sukcesaj kursoj gviditaj de prof. Geraldo Mattos la Esperanto-societo de la brazila ĉefurbo (C.P. 11-1124, BR-70084 Brasília - DF, Brazilo) nun organizas Kulturan Semajnon de la 22a ĝis la 28a de julio, kiu entenos aron da prelegoj kaj kurson pri tradukado en kaj el Esperanto.

● **Hungario:** La hungara ŝtato lastatempe honoris plurajn estraranojn de Hungara Esperanto-Asocio. D-ro Ferenc Nezával, eksministro pri justico, parlamentano kaj prezidanto de HEA, ricevis Laŭrokronan Flagordenon, Imre Kutas, eksambasadoro, ricevis la ordenon "Por la socialisma Hungario", d-ro Imre Pethes, eksa vicfakestro de Hungaraj Ŝtataj Fervojoj, vicprezidanto de HEA, ricevis la ordenon "La 4a de aprilo", d-ro Árpád Rátkai, katedra lekciisto, ricevis la bronzan gradon de "Ordeno de Laboro". Ankaŭ du anoj de Hungara Esperanto-Teatro ricevis honorojn. Ili estas Emil Keres kaj Zoltán Gera.

● **Pollando:** Raporto pri la instruado de Esperanto en Pollando dum la dek du

monatoj ĝis la fino de aprilo 1985 montras, ke okazis 101 unuagrada, 30 duagrada kaj 5 triagrada kursoj. Pliaj kursoj organizitaj de filioj de Pola Esperanto-Asocio estis unu specialfaka kurso kaj 10 konversaciaj kaj konsultaj kursoj. Okazis 34 kursoj en elementaj lernejoj, 44 en mezlernejoj, 20 en altlernejoj kaj 20 en junularaj kulturdomoj. Krome okazis po 6 kursoj en du feriaranĝoj, aldone al tiuj en infankolonioj. Krom korespondaj kursoj por plenkreskuloj kaj infanoj, okazis ankaŭ 3 pedagogiaj kursoj por rajtigi kursgvidantojn kaj pluraj aliaj konferencoj kaj seminarioj pri Esperanto-instruado.

● **Sovetunio:** De la 9a ĝis la 11a de majo okazis en Tjumen la 7a Urala Esperanta Rendevuo. La programo enhavis i.a. fakajn, klerigajn kaj porkomercantajn erojn. Por la unua fojo en Uralo oni organizis paralelan programon por novaj esperantistoj. La regiono ŝajnas esti unu el la plej viglaj centroj de Esperanto-agado en la lando. Poste en la jaro okazos apartaj renkontiĝoj en Perm, Ufa, Tjumen, Sverdlovsk kaj Surgut.

● **Svedio:** Partoprenis la ĉi-jaran svedan Esperanto-kongreson 122 personoj, kun eksterlandanoj el Pollando, FR

Foto: Paul Engert



● **FR Germanio:** La 13an de aprilo aperis en la ĵurnalo de Aŭgsburgo *Augsburger Allgemeine* (325 000 ekzempleroj) artikolo kun la titolo "Sentoplana litoflustrado sonas tre dolĉe ankaŭ en Esperanto"! La artikolo, kiun akompanis la foto, montras de maldekstre urbestron d-ron Ludwig Kotter, Grégoire Maertens, prezidanton de UEA, ĉefurbestron de Aŭgsburgo Hans Breuer, kiu aŭdacas reklami nian konkuranton, Hermann Schmid, sekretarion de LKK, kaj magistratanon Erich Sandner.

Germanio, Nederlando, Francio kaj Bulgario. Pola duopo prezentis la teatraĵon *Kataki malamiko* de Shimon Wincelberg. La inaŭguran paroladon en Esperanto faris la prezidanto de la sveda parlamento, Ingemund Bengtsson. La nova prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio estas s-ino Karin Lindquist.

● De la 31a de majo ĝis la 2a de junio la sveda sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia festis sian 50-jariĝon dum jarkonferenco en Södertälje, sude de Stokholmo. Partoprenis 40 personoj, kelkaj el eksterlando. La nove elektita prezidanto de la sekcio estas Bengt-Olof Nilsson.

● **Svislando:** Ni ne kutime mencias la aperon de nova strato "Esperanto" aŭ "Zamenhof", ĉar tio estas jam kutima okazaĵo, sed la 27an de aprilo oni inaŭguris la unuan placon "Esperanto" en Svislando. Ĝi estas en Solduno, kvartalo de la urbo Locarno. La inaŭguran ceremonion, kun muziko kaj paroladoj, partoprenis la urbestro, ŝtata konsilisto, direktoro de la kantona edukdepartemento, prezidanto de Tiĉina Esperanto-Ligo kaj la prezidanto de Svisa Esperanto-Societo.

● **Dentokuracado:** La grupo, kiu eldonas la bultenon *Stomatologia forumo*, la stomatologia sekcio de Universala Medicina Esperanto-Asocio, kompilas plurlingvan dentoteknikan vortaron. Kunlaboremaj kolegoj estas petataj skribi al d-ro Balázs Szemök, Pozsonyi út 2, H-2737 Ceglédbercel, Hungario.

● **Hidrologio:** Internacia Asocio por Hidrologiaj Sciencon (IAHS) okazigos sian venontan Sciencan Asembleon en Budapeŝto de la 2a ĝis la 10a de julio 1986. Se tie partoprenas certa nombro da esperantistoj, eblus aranĝi samtempan Esperantan simpozion de akvo- kaj flu-fakuloj. D-ro Haszpra, profesoro de fluaĵmekaniko kaj hidraŭliko, petas ĉiujn esperantistojn, kiuj partoprenos la konferencon informi lin kaj indiki, per kio ili pretas kontribui al tia simpozio. Pliaj detaloj estas haveblaj de d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg hp.u. 5, H-1054 Budapest, Hungario.

● **Radio:** La 7-an de julio komenciĝos tutlande aŭdebla Esperanto-elsendado

de Hungara Radio. Radio Budapeŝto disaŭdigas ĝin en sia tria programo pere de modulitaj frekvencoj. Ĝi estos kaptebla ankaŭ en la najbaraj landoj. Kvinminutaj programoj komenciĝos dimanĉe je 13h05 laŭ la mezeŭropa tempo (UTC 11h05). La dissendojn plenumos dek unu elsenduroj inter la frekvencoj 67.04 kaj 72.08 megahercoj. La Esperanto-programo de Radio Budapeŝto estos redaktata en Pécs, kies regiona stacio ekde 1982 havas 5-minutajn Esperanto-disaŭdigojn dum la someraj monatoj (vd. la detalojn en la maja numero de *Esperanto*, p.100). Reagojn al ambaŭ radio-elsendoj oni sendu al Radio Pécs, Esperanto, Pf.200, H-7601 Pécs, Hungario.

● **Naturscienco:** En volumo 11 de la luksa kaj prestiĝa jarlibro *Museumleven* (Vivo de la muzeoj), eldonata kun

apogo de la flandra ministerio pri kulturo (Belgio), aperis Esperanta resumo post teksto pri la rolo de tutnacia naturhistoria muzeo, verkita de d-ro W.M.A. De Smet. Ankaŭ la flandra revuo *Marsswin*, kiu traktas pri marmamuloj, ofte publikigas Esperantajn resumojn. La rezolucio de la 5a Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Sciencoj (Antverpeno, 1982), kiu rekomendis la uzon de resumoj en la Internacia Lingvo, helpis konvinki la redaktorojn.

● **Poezio:** Triesta Esperanto-Asocio, Italio, organizas konkurson de libertema originala Esperanta poezio por la Semajno de Internacia Amikeco 1986. La limdato estas la 31a de aŭgusto ĉi-jare. Detalojn sendas d-rino Ariella Colombin, via Alfonso Valerio 85, I-34128 Trieste, Italio; ☎ (040) 56 70 14.

Personoj

● **Jackson:** Ian Jackson, prezidanto de TEJO, nun loĝas kaj laboras en Honkongo. Lia nova adreso estas 2505 Edinburgh Tower, The Landmark, 15 Queens Road Central, Honkongo.

● **Rosbach:** Johan Hammond Rosbach verkis 500-paĝa etimologian libron, kiu nomiĝas *Levande ord* (Vivantaj vortoj), kiu aperis pasintan novembron ĉe la eldonejo Aventura (Arbiens gate 7, N-0253 Oslo 2, Norvegio; 290 norvegaj kronoj). En la nacia gazetaro la verko trovis entuziasman akcepton. Prof. Helge Nordahl, en duonpaĝa recenzo en la ĵurnalo *Morgenbladet* (10 mil ekzempleroj) skribi i.a., ke Rosbach estis la ĝusta homo por verki tian libron, ĉar li okupas sin ne nur pri la pasinteco, sed kiel aktiva esperantisto estas konscia ankaŭ pri la estonteco. En la verko aperas Esperantaj glosoj paralele kun la alilingvaj.

● **Kolker:** La 25an de aprilo en Instituto de Lingvoscienco sub Akademio de Sciencoj en Moskvo, Sovetunio, Boris Kolker defendis sian disertacion pri "Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto". La scienca gvidanto estis prof. Magomet Isajev. Rezulte de la sukcesa defendo, la disertacia konsilio aljuĝis al Kolker la gradon de "Kandidato de filologiaj sciencoj", ekvivalento de la grado doktoro en aliaj landoj.

● **Lins:** La 16an de majo aperis intervjuo kun d-ro Ulrich Lins (FR Germanio) en la tutlande legata urdua ĵurnalo de Rawalpindi *Nawa-i-Waqt* (Voĉo de la tempo). Kvankam la intervjuo ne aparte temis pri la Internacia Lingvo, ĝi estis farita en Esperanto. Interpretis s-ro Saeed Ahmad Farani, sekretario de Pakistana Esperanto-Asocio.

● **Umeda:** S-ro Umeda, vicprezidanto de UEA, kaj s-ino Janet Birby, eksprezidanto de Esperanto-societo de Ĉikago, Usono, estis intervjuitaj en la programo *Weekly Edition* (Semajna eldono) de la studenta televidstacio Northwestern, kiun oni dissendas pere de la kablotelevida reto Evanston. La kvin-minutan programeron rigardis inter 80 kaj 120 mil hejmoj en la regiono.

Anoncedoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncedoj kaj anoncoj ne respondeblas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncedoj.

Unika plurlingva kompara Esperanto-leksikono en 120-paĝa broŝuro. Aŭfrankite: 22 frankoj aŭ 8 irpk. Ligue Française "Pro Unesco", 24 avenue Riedenheim, F-68100 Mulhouse. Pĉk 16.233.37 C Paris.

Gepatroj! Instruistoj! Instigu viajn infanojn skribi petante onklon aŭ onklinon en alia lando. Informojn de Geonkloj Esperantistaj, c/o s-ro W.H. Simcock, Clayton House, Butterson, Leek, ST13 7SR, Britio.

25-jara litova biologino volas korespondi kun geamikoj el okcidenta Eŭropo pri vojaĝoj, hundoj, naturismo, muziko, Esperanto-instruado kaj aliaj temoj. Kolektas bildkartojn pri hundoj. F-ino Rožé Aukštikalnytė, Ab. d. 1467, SU-232040 Vilnius 40, Litovio, Sovetunio.

Hola gesamideanoj! Se por vi Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ ideo, skribu al Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio. Ni havas ion interesan por vi!

La kancerkliniko, la gazeto, kiu baldaŭ havos pli da kunlaborantoj ol da abonantoj! Kvar sinsekvaj numeroj + jara suplemento: 75 francaj frankoj. S-ro J. Le Puil, 5 Place Lavoisier (apt. 61), F-93380 Pierrefitte; pĉk. Paris 12 729 73 X aŭ UEA klik-g. Provekz. 3 irpk.

Pordoj malfermiĝas! Aperis 84-paĝa legolibro de humuraj teatraĵoj kun ekzercoj de Stefan MacGill. Prezo ĉe UEA: 8,10 gld.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Fiera Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Asocio de adventistoj esperantistaj estas planota. Kontakto s-ron Kjell Peder Hoff, Bjørkenes, N-1970 Hemnes i Høland, Norvegio.

Korespondadojn de la forpasinta d-ro Setälä havas d-ro W.A. Verloren van Themaat, Volkerakstraat 38/1, NL-1078 XT Amsterdam, Nederlando. Kontraŭ sendo de 5 internaciaj respondkuponoj li sendos fotokopiojn.

Ingvar Schoultz transloĝiĝis el Roterdamo al: Kvarngatan 10 A 1/2 tr., S-116 47 Stockholm, Svedio. Korajn salutojn al ĉiuj geamikoj kaj konatoj!

TEJO- seminario, Tuzla

Oni ankoraŭ atendas vian aliĝon al la venonta seminario de TEJO. Ĝin kunorganizas Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio. Ĝi okazos de la 22a ĝis la 28a de septembro 1985, en la bosnia universitata urbo Tuzla. La seminario temo estas **Kooperativoj kaj junularo**, kaj estas atendataj altnivelaj kontribuoj de spertuloj el pluraj landoj. Okazos flank-programo de kultur-amuzaj aranĝoj, tiel ke vi povas atendi kaj distran kaj ĝinde edukon semajnon. Dank' al subvencio de Eŭropa Junulara Fondaĵo, TEJO ofertas al vi **ĉioninkluzivan kotizon de nur 150 nederlandaj guldenoj** kaj **repagon de la duono de viaj vojaĝkostoj**, kondiĉe ke vi uzu la plej malmultekostan vojaĝeblecon. Tuj aliĝu ĉe UEA, sendante, kiel antaŭpagon, 30 guldenojn kun noto, ke temas pri pago por la seminario en Tuzla, kaj la reston vi rajtas pagi surloke.

Vi ekamis ilin ĉe la UK en Kanado. Nun posedu nian unuan diskon

KARSPIRO® Kvar humuraj kaj inspiraj originalaj kantoj, verkitaj en Esperanto.

Eld. Muzikoro, San-Diego. 33t/m. 18cm. Duflanka. Prezo: 21,00gld. plus sendokostoj. Mendu de Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



esperanto

MJ-membroj!

kial ne venontjare ŝanĝi vian membrokategorion kaj ricevi regule ĉi tiun revuon?

Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:

"La gazeto ne nur estas en si mem interesa, stimula kaj pedagogie valora; mi trovis ĝin la plej bona propagandilo, kiun mi havas. Tuj kiam homoj vidas, ke ekzistas serioza, inteligenta kaj dece prezentita gazeto pri aktualaj aferoj kaj kulturaj fenomenoj, tio ege altigas la prestiĝon de Esperanto."

Marjorie Boulton pri MONATO

Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo: **MONATO**, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).



Emistudio estas kanada Esperanto-kooperativo kies kunlaborantoj estas membroj de la familio du Temple

EMISTUDIO

Nova Produkto: Emistudio anoncas la UNUAN KASETON DE VESELIN DAMJANOV:
TITOLO: VESELIN DAMJANOV KONCERTAS EN KANADO.

La kaseto prezentas operajn ariojn, popolkantojn, kaj kanzonojn ne troveblajn ĉe diskoj. Profesie registrita en teknike plej moderna studio kun kolora bildo de la kantisto, la kaseto havas falditan enfermaĵon kun tekstoj de la Esperantaj kantoj. La kaseto estas unika donaco por neesperantistoj, ĉar ĝi prezentas kantojn ankaŭ en la lingvoj franca, itala, rusa, angla kaj bulgara. Eminent donaco por amiko, ĝinda kaj melodia aŭskultado por vi de la plej fama kaj riĉa baritona voĉo en Esperantujo. Subtila pruvo al la ĝenerala publiko pri la beleco de Esperanto. Mendu ĉe Emistudio por \$11,00 kan., aŭ ĉe UEA por 31,80 gld.



BUKEDO DE LA MONATO. Ĉiumonate EMISTUDIO donas premion al bona esperantisto. Gesamideanoj bonvolu sendi al Emistudio nomon de inda esperantisto kun klarigo kial tiu indas ricevi kaj premion kaj "bukedon". Tiu kun la plej granda kvanto de proponintoj gajnos. La premio estas la varo supre reklamita.

ROZBUKEDON KAJ PREMION GAJNAS ĈI-MONATE
FLÓRA SZABÓ-FELSŐ EL HUNGARIO

EMISTUDIO 765 Braemar Avenue, Sidney, BC V8L 3S1, Kanado.

Kvar novaj verkoj



Li kaj ni; Festlibro de Akademio de Esperanto omaĝe al prof. Gaston Waringhien (1901). Redaktis Reinhard Haupenthal. 520p. Ilus. 22cm. ISBN 90 6336 034 7. Pompa volumo, al kiu kontribuis 49 konataj eminentuloj sur diversaj kampoj interalie per originalaj literaturkritikaj, esperantologiaj kaj interlingvistikaj artikoloj kaj traktaĵoj. La libro havas biografiojn pri Waringhien kaj la kontribuintoj kaj bibliografion de la verkaro de Waringhien; (kun faksimiloj de korespondaĵoj de L.L. Zamenhof). Prezo: 66,00gld.

Du el; de Marjorie Boulton (1924) kaj Poul Thorsen (1915). 250p. Ilus. de Jean Bomford. 22cm. ISBN 90 6336 033 9. La duela duopo de du socikonsciaj kaj humurplenaj poetoj prezentas komunan volumon de tre varia poezio. Prezo: 33,00gld.

Kaverno apud la maro; De Bertram Potts (1895). 228p. 22cm. ISBN 90 6336 025 8. Dek unu noveloj originale verkitaj en Esperanto, el kiuj *Kaverno apud la maro* estas unu, de aŭtoro ŝatata pro sia novelarto kaj poezio. Prezo: 27,00gld.

La vualo de l' tempo; de J.H. Sullivan (1913). 116p. 22cm. ISBN 90 6336 028 2. Dudek originalaj noveloj el la plumo de verkisto konata por siaj krimnoveloj por infanoj. Prezo: 19,50gld.

Rabato de unu triono por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj, plus sendokostoj. Mendu de la Libroservo de UEA, Nw Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



Kulmino de la roman-arto de Sudameriko

DOÑA BÁRBARA

de **Rómulo Gallegos** (1884-1969),
majstra priskribinto de la sudamerika
pejzaĝo, en 1947 ŝtatestro de Venezuelo.

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de
nia arta prozo..." Juan Régulo Pérez

"Granda kvalito de la verko estas la perfekteco
de la lingvo. ... rara juvelo, ..." Gaston Waringhien

"La traduko impresas mirinde klara kaj pose-
das la netan rigoron de la kabea stilo en *La
faraono*." Henri Vatré

El la hispana trad. F. de Diego. Karakaso: Venezuela Esper-
anto-Asocio, 1975. 264p. 21cm. ISBN 84 399 2885 8. Prezo:
nur 16,20 gld. (UEA estas la ĉefdistribuanto, do vi ricevos de
la Libroservo de UEA **rabaton de unu triono** por mendo de
minimume tri ekzempleroj) plus sendokostoj.

Je ĉies avantaĝo

La Libroservo de UEA transprenis stokojn de
Eldonejo TK/Stafeto. UEA ne nur **malaltigis
multajn prezojn**, sed ankaŭ donas **rabaton de
unu triono** (plus sendokostoj de 10%, kun
minimumo de 5,00 gld.) por samtempa aĉeto de
minimume tri ekzempleroj de samtitola libro,
sendotaj al la sama adreso:

	gld.
<i>Ĉu li bremsis sufiĉe?</i> Johán Valano	12,00
<i>Ĉu li venis trakosme?</i> Johán Valano	18,00
<i>Ĉu ni kunvenis vane?</i> Johán Valano	21,00
<i>Ĉu ŝi mortu tra-fike?</i> Johán Balano	15,00
<i>Esperanto aŭtodidakte</i> Audrey Childs-Mee	24,00
<i>Fabeloj de la verda pigo</i> Louis Beaucaire	18,00
<i>Hieraŭ – hodiaŭ – morgaŭ</i> Bernard Golden	12,00
<i>Hieroglifo</i> Julia Pióro	9,60
<i>Je la flanko de la profeto</i> Italo Chiussi	30,00
<i>Kaj la ceter' nur literaturo</i> Gaston Waringhien	36,00
<i>Kara diablino</i> Douglas Boatman	9,00
<i>Kumeŭaŭa</i> Tibor Sekelj	9,00
<i>Lidja Zamenhof</i> Isaj Dratwer	9,00
<i>Misio sen alveno</i> John Francis	21,00
<i>Primico</i> Robindronath Tagor	9,00
<i>Trofeoj</i> José Maria de Heredia	9,00

Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

URĜA ALVOKO: La sola espero rilate la solvon de la
mondvastaj problemoj estas la reveno al la bibliaj in-
struoj. Por ricevi senpagan libreton kun fascinaĵoj, detal-
oj, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road,
Poole, Britujo BH 17 7LN** aŭ, se ekster Eŭropo al: **P.O.
Box 373, Baronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**